

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Esperanto,
ĉu lingvo
por Eŭropo?**



Kalendaro 2000



Verda vivo ĉina



**Monda Tago
de Poezio**



Paco: Por kiam la rikolto?

Vi trovos

41 *Malferme*

Donu ankaŭ vi ŝancon al la paco

Renato Corsetti

42 **UNESKO KAJ LA PALESTINANOJ**

Cristina L'Homme



**La dua filo de Abrahamo:
Araboj en Israelo**

Amri Wandel

44 *Literaturo*

Libroservo superis plian pinton

Osmo Buller

Kulturaj ŝprucoj

Marta Pastor

**Eternas fluo poezia:
Riveroj samnomaj**

poemo de Edwin de Kock

46 *Memore*

Verda fervoro tra ruĝa hororo

SHI Chengtai

47 **Reagoj**

48 **Kalendaro 2000**



52 **Recenzoj**

Seán Ó Riain pri

**ABC de la Eŭropa Unio kaj
Eŭro. Ecoj kaj sekvoj por ĉiuj**

Miko Sloper pri

PoLimoRFiA ArKiteKniA

Stefan MacGill pri

Hejma vortaro

Giulio Cappa pri

ses verkoj de G. Ledon

Sabira Ståhlberg pri

La familio

Valentin Melnikov reagas al recenzo pri

Moskvaro



55 **Laste aperis**

Kaj plue...

56 **Loke - Persone - Influe**

58 **Fake**

Oficiala Informilo

59 **Foliume**

60 **Forpasoj**

La kovrilo: Palestina virino rikoltas. (Sharon Abbady/Evoluiga Programo de UN)

Dekstre: Tel-Aviva plaĝo (zorge de M. Ben-Porat)

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.

Grafiko: Francisco L. Vuthey.

Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktotino: la 10-a de ĉiu monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 68,32; USD 34; DEM 59; JPY 3900 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas € 3,00.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zapelli.



DONU ANKAŬ VI ŜANCON AL LA PACO

Laŭ la ĵargono de Unesko “flag-ŝipa evento” estas io kion ni pli klare nomus Esperante “evento voj-montra”. Ke Unesko decidis nomi la Tel-Avivan UK unu el la “flag-ŝipaj eventoj” de la Internacia Jaro de Kulturo de Paco, estas do fakto voj-montra por la esperantistoj. Ne malpli voj-monstre: la Estraro de UEA dediĉis la kongreson al la temo “Lingvo kaj kulturo de paco”, kaj Unesko-representanto mem parolos en la UK pri tiu Jaro.

Kiel vi vidas, centre rolos la temo “paco”. Oni tiom parolas pri ĝi ĝuste ĉar paco ankoraŭ ne ekzistas en la mondo kaj precipe ne en la t. n. Meza Oriento.

Oni devas daŭre strebi por konservi pacon. Ĝi ne estas situacio kiu mem konservas sin. Tiu strebado estas unu el la gravaj elementoj de la esperantista agado.

Paco, aliflanke, postulas penan intertraktan laboron, ĉar ĉiu konsentas pri ĝeneralaj principoj (“paco kaj Esperanto estas bonaj aferoj”), sed ne pri konkretaĵoj (“por atingi pacon, vi devas pagi pli por benzino”, “por lerni E-on vi devas aĉeti kaj trastudi lernolibron”). Kaj en Meza Oriento la situacio estas tiom komplika ke apenaŭ homoj ekster la regiono komprenas ĝin.

La ŝablonaj ideoj, kiel “Israelo estas lando moderna kaj demokratia”, aŭ, male, “lando agresema, kiu ne respektas la homajn rajtojn”; “araboj estas ĉiuj teroristoj”; aŭ, male, “viktimoj de la usona politiko pere de Israelo”, ne eltenas komparon kun la surloka realo.

Kongresanoj povos mem sperti la situacion kaj formi personan juĝon preter la simpligitaj opinioj kiujn trudas amas-informiloj. La debatoj dum la UK ebligas senkaŝe kompari vidpunktojn. Tie vi povos demandi israelajn e-istojn pri faktoj kaj opinioj — kaj same renkonti kaj demandi arabojn, en kaj ekster Israelo. Pluraj eventoj ĉirkaŭ la UK ebligas kompari vidpunktojn.

Ni deziras ke esperantistoj kontribuu per siaj ĉeesto kaj ideoj al la pac-procezo, kiu, preskaŭ kiel la E-movado mem, “stagne antaŭeniras”. Ni estos tie por diri ke ĝi ja devas progresi — kaj vi vidos ke granda procentaĵo de la israela loĝantaro samopinias, same kiel granda parto de la araba loĝantaro en la ĉirkaŭaj landoj.

Kvankam Israelo estas lando kies nura nomo tuj elvokas fortan simpation aŭ malsimpation, vi ne rajtas fari juĝon sen rektaj informoj. Tiujn vi povos akiri partoprenante la unuan grandskalan E-eventon en tiu regiono. Nia UK estos ne nur kongreso en Israelo, sed evento kiu ebligas al vi koni la tutan Mezan Orienton.

Vi eble memoras ke en Montpeliero vi decidis ke Esperanto pontu en komplikaj situacioj ankaŭ inter la nordo kaj la sudo. En la Meza Oriento tio ekkazas inter mil malfaciloj, sed la unuaj kontaktoj inter israelaj kaj arabaj esperantistoj jam ekestas. Venu kaj kontribuu ankaŭ vi en originala maniero al la pac-procezo!

Renato Corsetti



De ses jaroj la
palestinanoj
lernadas la

Unesko kaj la pa

sencon de vortoj kiel *repaciĝo, unuigo, paco*. Unesko helpas ilin en la kampo de edukado, kulturo kaj interkomunikado, kun prioritata atento al



Por ke la paco israela-palestina forlasu la surpaperan stadion kaj fariĝu realaĵo, necesis ke ĝi ekvivu ne nur en la politiko. Pro tio, apenaŭ tri monatojn post la subskribo de la pac-interkonsento la 13-an de septembro 1993, Unesko invitis la tiutempan israelan ministron pri eksterlandaj aferoj, Ŝimon Peres, kaj la estron de Palestina Liberiga Organizaĵo, Jaser Arafat, renkontiĝi kun intelektuloj el la tuta mondo en Granado (Hispanio). La evento ekhavis la nomon “Granado 1”: temis pri du tagoj por ebligi rektan dialogon inter israelanoj kaj palestinanoj, sed antaŭ ĉio por starigi Programon por Asisto al la Palestina Popolo (PAPP). Alivorte, por kuraci ankoraŭ sangantajn vundojn kaj krei etoson favoran al la apliko de la pac-interkonsento, por forigi timojn, kaj precipe por provizi per rekonstru-rimedoĵ ĉi tiujn homojn tro longe milit-plagitajn.

La tasko montriĝis neniom facila. Unue, el vidpunkto institucia: “Ni devis komenci ĉe nulo, ĉar ekzistis nek



La dua filo de Abrahamo: Araboj en Israelo

En la unua tago de la UK (25 jul.) okazos seminario en “Pac-oazo” pri paco kaj kunekzisto.

Pac-oazo estas tre speciala vilaĝo, unika en Israelo, kie kune vivas judaj kaj arabaj familioj, en dueco tre malofta. La seminario, kadre de la “lernejo de paco” de la vilaĝo, traktos interalie la situacion kaj historion de la araboj en Israelo kaj la strebon por ĉiutaga kunekzisto. Ĉu la du popoloj — juda kaj araba — povas harmonie kunvivi en sama lando? Ĉu eblas konstrui sanan kaj justan socion kaj ekonomion, en kiu integriĝos ambaŭ popoloj? Jen kelkaj el la seminarioj demandoj. Kvankam Israelo havas grandan araban minoritaton, la du popoloj loĝas en apartaj vilaĝoj kaj urboj. Kelkaj urboj — Hajfo, Nazareto, Akko, Ramla, Jafo k.a. — havas kaj judajn kaj arabajn loĝantojn, sed plej ofte en apartaj kvartaloj.

Post la araba konkero de la lando en 1340, la araboj iom post iom fariĝis plimulto, kaj Islamo la plej disvastigita religio. Dum la 20-a jarcento pli kaj pli altiĝis la proporcio de judoj, ĉefe pro enmigrado, eĉ akcele post la dua mondmilito kaj la starigo de Israelo kiel memstara

ŝtato. Nuntempe la araboj (kaj aliaj minoritatoj) formas ĉ. 20% de ĉi ties loĝantaro. Proksimume tri kvaronoj de la araboj en Israelo estas islamanoj, kaj la ceteraj kristanoj. Kontraŭe al la judoj, kies plimulto loĝas en la urboj, la araboj en Israelo majoritate loĝas en agrikulturaj vilaĝoj, sed ili pli kaj pli ekokupiĝas pri industrio kaj akademaj metioj. Samtempe daŭre plialtiĝas ilia vivnivelo kaj la procentaĵo loĝanta en la urboj — tendenco simila al tiu ĉe la juda loĝantaro.

Oficiale la araboj havas ĉiujn civitanajn rajtojn, inkluzive de la rajto voĉdoni por la parlamento (en kiu ekzistas pluraj arabaj partioj). En la praktiko aŭdiĝis ja plendoj pri diskriminacio en la labormarkato, sed la situacio multe pliboniĝis en la lastaj jaroj. Pli da arabaj studentoj studas en la universitatoj, pli alta procentaĵo fariĝas advokatoj kaj kuracistoj, kaj pluraj atingas altan postenon kiel parlamentano kaj urbestro.

Amri Wandel - Israelo

נוה שלום
Neve Shalom
واحة السلام
Wahat al-Salam
(Oasis of Peace)

lestinanoj



Krom kovria foto kaj Unesko-simbolo: Newa Shalom / Wafat al-Salam ("Pac-oazo"), Israelo; <http://newas.com>

La lernejo de "Pac-oazo" estas la sola en la lando kie dulingvan, dukulturan studprogramon kune sekvas judaj kaj palestinaj infanoj.

ŝtato-strukturo nek publikaj servoj ĉu en Palestino, ĉu en Cisjordanio ĉu en Gazao", klarigas Omar Massalha, la estro de PAPP. "Temas pri loko en kiu malfacilas havi centran administran instancon", aldonas Pierre Runner (Internacia Instituto por Eduka Planado), "des pli ke ĝia diseca situo tre ĝenas interkomunikadon, kaj ĉio alia fakte restas sub la rego de la israelanoj: eĉ, ekzemple, la nombro de niaj plan-komitataj kunsidoj, kiujn ili permesas nur unufoje en ĉiuj du monatoj." Estas same pri aliro al frekvencoj por palestinaj televidaj programoj, kiuj, laŭ Georges Dupont (de la Unesko-projekto "Komunikiloj por Palestino"), "tute dependas de israela monopolo", konforme al la Konvencio de Internacia Telekomunika Unio (ITU).

La nova logiko de paco

Ankaŭ la palestinanoj bezonis adapti sian konduton al la novaj cirkonstancoj: "pro sia historio ili ne komprenas la signifon de kolektiva aŭ publika proprietaĵo", klarigas la direktoro de PAPP. "Ekzemple, militintoj ĉiam deziras malaperigi siajn spurojn": kompreneble laŭ la agad-logiko de Intifado*, sed ne kongrue kun paca socio kaj eĉ malpli kiam internacia financa helpo komencas enflui.

Necesis do "persvadi ilin ŝanĝiĝi kaj turni sin al la estonteco anstataŭ resti katenitaj de sia pasinteco," diras Omar Massalha. Tio ne estas facila, se konsideri ke la civila socio restas jam multajn jarojn en stato de insurekcio

kaj nun devas adaptiĝi al la koncepto de "pozitiva konstruado", pri kiu ĝi havas nur abstraktan bildon. Kaj des malpli facila ĉar la tuta popolo daŭre vivadas en necerteco, kun la sento ke ĉio povas ŝanĝiĝi de unu sekundo al alia, kiam strata promeno aŭ infanludo povas finiĝi per sangelveso. Hodiaŭ, kiel antaŭe, diras Pierre Runner, "estas malfacile, sed ne ekzistas alternativo. Se konsiderante ion kiel maljustaĵon oni reagis per venĝo, nenio iam ajn ŝanĝiĝos". Pro tio ke la estonteco oni konstruos sur la ŝultroj de la hodiaŭaj infanoj, PAPP fokusiĝas al edukado. "Ĉi tio, aldone al la kulturaj elementoj, estas la ĉefa unuiga faktoro por la lando," diras Pierre Runner. "Gepatroj multe zorgas pri la edukado de siaj infanoj; ili estas pretaj ĝin subteni persone kaj finance."

Do, necesas konstruigi lernejojn kaj doni al la infanoj la eblon studi, kredi kaj remalkovri la esencon de sia identeco pere de studplano kiu finfine mencias la historion ankaŭ de la palestinanoj. Ili devas ricevi la rimedojn por kuraci la milito-vundojn, por lerni metion, por edukiĝi, sed ankaŭ por revivigi sian kulturan heredaĵon. Mallonge, do, Palestino devas ricevi helpon por revalorigi siajn homfortojn.

Malbloki la etoson

Kiel ĉiuj bonaj intencoj, ankaŭ tiuj de Granado 1 devis submetiĝi al la kapricoj de politiko. "Kiam la paco-procezo renkontis komplikaĵojn en 1997, ni iniciatis novan dialog-procezon sub la nomo Granado 2," klarigas Daniel Janicot, asista ĝenerala direktoro de Unesko. Ĉi tiu nova interkonsento celas starigi israelan-palestinan kunlaboron surbaze de unu el la principoj de la interkonsento de Oslo, nome la principo de kunlaboro inter la du popoloj. Tamen, laŭ Janicot, "tuj post la blokiĝo de la pac-procezo" tiu principo estis "tute profanita". Jen do Unesko fariĝis la forumo por renovigi la dialogon, kiu ĉi-foje devigis la civilajn sociojn rekte alfronti unu la alian. Per tio ĝi "efikas malbloke, ebligas pli malstreĉan etoson". Ĉar, kiel oni diras, grandaj eventoj dependas de individuaj mensoj, kaj paco konstruiĝas unuavice en la kapo de la homoj.

Pro tio israelanoj kaj palestinanoj lernos kunlabori kadre de projektaro (financota per sumo de unu miliono da dolaroj, de Unesko kaj de diversaj ŝtatoj, ekz. Hispanio) kiu kovros temojn ekde scienca kaj medicina esploro pri iuj virusoj tra kunlaboro pri muzika edukado kaj turismo, ĝis interreligia dialogado. Malgraŭ ĉio ĉi, la rilatoj inter la du popoloj restas mankohavaj: iuj homoj ankoraŭ sentas "malamon, timon kaj eĉ angoron kontraŭ la aliaj," diras Janicot, "sed bonŝance ekzistas ankaŭ dezirantoj partopreni kaj kunlabori por konstrui novan estontecon."

Cristina L'Homme (Unesco Sources, apr. 1999)

Tradukis, el la angla kaj franca, Helga kaj Johano Rapley

* Palestina rezist-movado en la teritorioj sub israela okupo (ekde dec. 1987)

Pri palestinanoj en Esperanto

Letero el Palestino. Vojaĝraporto pri popolo kondamnita al ekstermo. Santiago Alba. El la hispana trad. Georgo Kamaĉo [Jorge Camacho]. Thaumiers: La KromKancerKliniko, 1990. 16p. 29cm. € 3,40.

Libroservo superis plian pinton

Osmo Buller

Post nekutime vigla vendojaro en 1998, pasintjare eĉ pli da libroj moviĝis el la bretoj de la UEA-libroservo sur tiujn de legemaj klientoj.

Kiam la libroservo de UEA saldis la vendojn en 1998, la rezulto de 135 430 eŭroj (298 448 gld.) ŝajnis resti nesuperebla pinto de la jardeko. La UK, de kiu dependas la meandroj de la statistiko, estis iĝonta tiom malpli granda ol en 1998, ke eĉ nur proksimiĝi al sama rezulto estis granda defio. La defion ni tamen eĉ superis: kun totalo de 143 499 eŭroj (316 230 gld.) la vendoj kreskis 6%.

Kiam kreskas la vendosumo, plialtiĝas ankaŭ la enirlimo de la honor-tabelo de plej furoraj titoloj. Kiel kutime, ni prezentas du listojn: laŭ la nombro de ĉiuj venditaj ekzempleroj kaj laŭ tiu de unuekzemplero (ne-rabatite) venditaj. En 1998 la minimumoj estis 73 por la unua kaj 23 por la dua listo, sed en 1999 respektive 100 kaj 31.

Suma vendo de 73 ekz. sufiĉis ĉi-foje nur por la 38-a loko; en la senrabata listo 23 ekz. donis la 36-an lokon.



Entute estis venditaj 18 416 ekz. de 2057 diversaj titoloj de libroj, diskoj aŭ kasedoj. Averaĝe do vendiĝis po 9 ekz. de unu titolo, se lasi flanke tiujn 1500 titolojn stokatajn kiujn neniu volis.

Ĝojige ke unuafoje post 1990 ĉe la pinto staras lernolibro: kiel tiam, ankaŭ nun temas pri *Saluton!* Fakte, ju pli bone lokiĝas lerniloj, des pli kontentaj ni povas esti, ĉar lernantoj

estas nia estonteco. Tamen, la vera ĉampiono estas *Hejma vortaro*, kiu aperis nur fine de oktobro kaj ŝtorme ekvendiĝis.

Ne-libraj varoj — krom insignoj kaj kelkaj aliaj etaĵoj — rolas nur margene sur la E-merkato. En la entuta listo troviĝas nur unu kasedo, akompanaĵo de *Saluton!*, dum inter la unuopaj vendoj elstaris nur la KD... *sed estas ne!* de Persone. Eksterliste restis la plej furoraj vidbendo, *Esperanto bunte vivas* (63 entute, 26 unuope), kaj la KD-romo *Billy*, komputila ludo (resp. 26 kaj 6).

Beletraĵojn reprezentas nur *La ŝtona urbo*, *Faŭsto* kaj *Nova Esperanta Krestomatio* en la listo de unuopaj vendoj kaj neniu ĉe ĉiuj vendoj, sed pli-malpli tia estas ilia porcio ĉiujare.

Inter la eldonistoj elstaras UEA kun po 14 eroj el 21 en ambaŭ listoj. Ke UEA mem estis la plej aktiva eldonisto pasintjare, kompreneble parte influis al la bona vendorikolto. Ankaŭ por 2000 UEA havas ampleksan eldonplanon. Krome, la aperigo de nova katalogo, papera kaj reta, espereble sufiĉe kompensas la malgrandan kontribuon de la ĉi-jara UK. ★

VENDOJ ENTUTE

ekz.	titolo	prezo (€)
441	<i>Saluton!</i> , lernolibro de A. Childs-Mee*	10,80
387	<i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj de TEJO*	10,90
348	<i>Hejma vortaro</i> , red. J. Lindstedt*	7,50
309	<i>Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj</i> , L. Levin*	10,90
250	<i>Kio ni estas kaj kion ni celas?</i> , pri la Praga Manifesto* 5,50	
207	<i>Lingva arto</i> , festlibro Auld-Boulton, red. V. Benczik*	16,50
205	<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i> , gvidilo*	3,00
188	<i>Internacia Kongresa Universito 1999</i> , prelegaro, red. M. Lipari* 8,15	
131	<i>Ĉiuj kune</i> , aktoj de la 1-a Strategia Forumo*	2,15
128	<i>Spirito de E-o kaj la "samideanaj" malamikaĵoj</i> , eseo de I. Bociort* 1,50	
123	<i>Berlino por turistoj</i> , U. Becker [elĉerpita]	
116	<i>Grosses Wörterbuch Esp.-Deutsch</i> , E.-D. Krause 39,00	
115	<i>Faktoj kaj fantazioj</i> , M. Boulton*	16,35
112	<i>Saluton!</i> (kasedo al la lernolibro)* 5,45	
112	<i>Slango kaj ĵargono en Esperanto</i> , W. Pilger 3,90	
109	<i>Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj</i> , Gosciny/Uderzo 9,00	
106	<i>Por aktiva lingvopolitiko</i> , aktoj de seminario en 1996* 7,10	
104	<i>Esperanto Sleutel</i> , nederlanda ŝlosilo 0,90	
102	<i>Esperanto for beginners</i> , M. C. Butler 1,80	
100	<i>Esperanto sen mitoj</i> , Z. M. Sikosek 24,00	
100	<i>Monumente pri Esperanto</i> , H. Röllinger* 8,15	

*Eldonaĵoj de UEA/TEJO

UNUOPAJ VENDOJ

ekz.	titolo	prezo (€)
92	<i>Hejma vortaro</i> , red. Jouko Lindstedt* 7,50	
82	<i>Slango kaj ĵargono en Esperanto</i> , W. Pilger 3,90	
69	<i>Esperanto sen mitoj</i> , Z. M. Sikosek 24,00	
64	<i>Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj</i> , L. Levin* 10,90	
63	<i>Kio ni estas kaj kion ni celas?</i> , pri la Praga Manifesto* 5,50	
57	<i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj de TEJO* 10,90	
55	<i>La liturgia de l' foiro</i> , eseo de J. Camacho 2,70	
52	<i>Berlino por turistoj</i> , U. Becker [elĉerpita]	
50	<i>Lingva arto</i> , festlibro Auld-Boulton, red. V. Benczik* 16,50	
48	<i>La ŝtona urbo</i> , romano de A. Löwenstein 22,70	
46	<i>Spirito de Esperanto kaj la "samideanaj" malamikaĵoj</i> , eseo de I. Bociort* 1,50	
42	<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i> , gvidilo* 3,00	
39	<i>Faŭsto</i> , J. W. von Goethe, trad. K. Schulze 12,90	
39	<i>Kulturo kaj evoluo</i> , M. Claxton* 6,80	
37	<i>Saluton!</i> , lernolibro de A. Childs-Mee* 10,80	
35	<i>Por aktiva lingvopolitiko</i> , aktoj de seminario* 7,10	
33	<i>Terminologia gvidilo</i> , H. Suonuuti* 5,70	
33	<i>Klara vortaro Esperanta-araba</i> , G. Abraham* 13,60	
32	<i>... sed estas ne</i> , K-disko de Persone 15,00	
31	<i>Nova Esperanta krestomatio</i> , red. W. Auld* 12,30	
31	<i>Al lingva demokratio</i> , red. M. Fettes, S. Bolduc* 10,20	

Kulturaj ŝprucoj

Jen vigla raporteto pri evento esence privata. Sed kiel disigi privatan kaj publikan en poezio?

Pro koincidoj kaj hazardoj kolektiĝis por februara semajnfino grupo da beletremuloj en Madrido: Jorge Camacho, Miguel Fernández, Miguel Gutiérrez (Liven Dek), Riitta Hämäläinen, Ana Manero, Abel Montagut, Gonçalo Neves, Joxemari Sarasua kaj Antonio Valén.



Dancas "la du Miguel-oj": Fernández (maldekstre) kaj Liven Dek

En katakombaj klaroskuroj, en etoso amike varma kaj sprona, samtempe afable sed senkompate kritika, okazis escepte riĉa kultura programo. La ĉeestintaro ĝuis premierajn prezentojn de novaj poemoj kaj tradukoj, fragmentojn el aperonta romano de Abel Montagut, koncerton de hispanaj kantoj kiĉulaj kun aparte kortuŝa koreografio kaj provludojn de la teatra grupo "Ibere libere" por la Kultura E-Festivalo 2000 en Helsinko (17-23 jul.)

Eternas fluo poezia



Lastatempe Unesko deklaris la 21-an de marto Monda Tago de Poezio. Ni volonte salutas tiun Tagon per premiera aperigo de poemo de Edwin de Kock, kiu la 9-an de marto fariĝas 70-jara. Sanon kaj poezion!

RIVEROJ SAMNOMAJ

*Denove la vent' aludas ĝin,
en proksima sudo, la Rio Grande;
sed foje norde de l' fora Inĉon
oni ĝin nomis la Rivero Han,
dum okcidente trans Maro Flava —
en lando kiun mi neniam,
neniam sukcesis viziti —
ĝi vere enormis, Ta Chiang.
Jes, kaj alidirekte, ĉirkaŭ
terglobo, antikvis tute samnome*

*la Ĥarip', laŭ iamaj Boŝmanoj
kies ombroj maldaŭris sublune,
distaŭziga inter arbedoj,
kiel mia ĉe l' Grootrivier identa.
Ofte en ĉiaj lokoj kaj lingvoj
ĝi fluas el foraj montoj kaj jaroj
trans revojn fine apenaŭ gravajn
kaj ĉi memeton, salute, adiaŭe.*

1999.06.22

Abundis diskutoj pri esencaj alstreboj kaj vibroj de poemoj kaj poetoj, samkiel vetoj diverstemaj. El vetmalvenko ĉiuforte rezultis plia soneto por la E-literaturo. Se ĉiu semo tiusemajnfina ĝermos-

ŝosos-sprosos, oni povas atendi de la ibera grupo serion da novaj poemaroj, elstarajn romanojn, teatraĵojn kaj multon pli. "Sanon kaj maldegeneron!"

Marta Pastor · Madrido

EVA enketas pri la prefero de la publiko


Dum la lasta kunsido de Esperantlingva Verkista Asocio, en la Berlina UK, oni akceptis la proponon de kolego Tomasz Chmielik, kiu, apud la konata "Baza legolisto" de William Auld (vidu jan. '98, p. 16), ŝatus koni ankaŭ pli ĝeneralan elekto-liston de la publiko pri la 25 plej gravaj verkoj de la Esperanto-literaturo de la 20-a jarcento.

Pro tio EVA petas vin noti la titolojn de la Esperantaj verkoj (prozo, poezio kaj dramo) kiuj en via vivo ludis precipan rolon — edukan, klerigan, emocian aŭ konceptan —, kiuj plej firme engravuriĝis en via memoro aŭ kiuj simple estas plej valoraj por vi.

Via elekto montros kiuj literaturaj ŝatoj kaj preferoj regas en la "verda" mondo en la nuna tempo. Respondu prefere antaŭ majo, por ke dum la UK en Israelo oni povu prezenti la kompletan liston.

Poŝtkartojn kun titoloj sendu al Tomasz Chmielik, ul. Jarzębinowa 3/30, PL-21-040 Świdnik, Pollando; retroŝte respondu al Spomenka Štimatec (☐esperanto@zg.tel.hr).

**Vitrovas
almetita la
Manifeston 2000
de Unesko.
Libere kopiu,
disdonu, pridiskutu, resendu.**



Ni omaĝas al la memoro de Neil Salvesen (1944-1990), iama direktoro de la Centra Oficejo, kiu forpasis dolore frue antaŭ 10 jaroj, la 16-an de marto 1990.

Verda fervoro tra ruĝa hororo

Shi Chengtai · Ĉinio

En septembro 1999 sur la ĉielo de Ĉinio falis hele brilinta verda stelo – forpasis Jariĉ, kiun ni mallonge nekrologis en februaro (vidu p. 40).

Jariĉ (YANG Zongkun) naskiĝis en 1937. Li studis la anglan en Universitato Sun Jat-sen en Kantono kaj en 1956 lernis Esperanton.

La devenon de lia Esperanta nomo klarigas anekdoto: Dum la Granda Kultura Revolucio (1966-76) li laboris en la urbo Wuhan, sia hejmloko, kiel instruisto en mezlernejo. Tiam E-agado kaj korespondo kun fremdlandanoj estis rigardata en Ĉinio kiel kontraŭleĝa kulpo. Malgraŭ tio Jariĉ konservis diskon en Esperanto, flageton kun la verda stelo donacitan de korespondanto, duonon de la UEA-Jarlibro (la alia duono, la adresaro de delegitoj, jam estis elŝirita kaj konfiskita de la ĉina doganejo) kaj numeron de *Esperanto*. Ekvidinte tion dum vizito, s-ano Guozhu surprizite kriis: “Ho, ja riĉe!”

Jariĉ havis korespondajn amikojn en dekoj da landoj, de olduloj ĝis knaboj: deputitojn, profesorojn, sciencistojn, doktorojn, laboristojn, lernantojn, dommastrinojn kaj senlaborulojn. Li flegis amikecon kun Hugo Steiner, iama direktoro de Internacia E-Muzeo en Vieno, kiu aperigis lian nomon sur monumento en tiu muzeo; li akcelis la ĝemelan interligon

de la germana urbo Duisburg kun Wuhan; li sukcese instigis interfluadon pri medicina scienco inter ĉinaj kaj japanaj kuracistoj... Oni nomis lin

El nia revuo (feb. '79): Jariĉ tenas la flagon.



“koresponda ambasadoro por interpopola amikeco”.

Zamenhof-festo malantaŭ kurtenoj

Samideanoj en Wuhan ĉiujare celebris la Zamenhof-feston, eĉ dum la Kultura Revolucio malgraŭ la ruĝa hororo de Maŭ kaj ties ruĝa gvardio, ja en la hejmo de Jariĉ! Mallevinte la fene-

strajn kurtenojn, ili pendigis portreton de Zamenhof kaj la flagon kun verda stelo sur muro. Ĉiuj portis verdstelajn insignojn, propramane faritajn de Guozhu el karton-pecetoj. Ili kantis *La Espero*, prelegis, diskutis kaj fotiĝis kune por memoro! Tiam neniu butikokuraĝis riveli kaj kopii foton kun portreto de fremdlanda barbulo kiu ne estas Karl Marx, kaj kun flago kies stelo estas ne ruĝa sed verda; Jariĉ do mem rivelis kaj kopiis ĝin dumnokte.

En 1978 s-anoj okazigis kolokvon en la hejmo de Jariĉ, por bonvenigi alvenon de “Printempo de E-movado en Ĉinio post Maŭ”. Ilia foto aperis sur la kovrilo de *Esperanto* (feb. '79), sub la instiga titolo “Ĉinoj (re)venas!” Sur la foto Jariĉ meze sidas, kun la verdstela flago en la mano.

La “germana” kongresano

Ŝanco fine alvenis. La 71-a UK (1986) okazis en Pekino. Tamen, la LKK limigis la ĉinan ĉeestantaron al entute 300 personoj! Jariĉ ne troviĝis inter la 15 permesitoj el provinco Hubei. Tio grande doloris la ĝisostan esperantiston. Feliĉe, lia germana korespondamiko etendis helpan manon, pagante lian kotizon por UK per markoj. Fine, dum la 300 ĉinaj “delegitoj” loĝis kolektive en la amasloĝeja Hotelo Haidian, sole Jariĉ restadis en Hotelo Huangcun, fronte en la sama strato — kiel kongresano el Germanio, laŭ sia nomŝildo sur la brusto.

Por ĉeesti la 72-an UK en 1987, okaze de la centjara jubileo de nia kara Esperanto, Jariĉ, malriĉa ĉina instruisto, decidis veturi per trajno tra Siberio kaj Moskvo. Tamen, kiam li fine akiris la vizon, la biletoj de la lasta trajno antaŭ la kongreso jam estis forvenditaj! Li obstine atendis ĉe ĝiĉeto de la stacidomo en Pekino ĉu iu redonos bileton. Ho, ĉielo: bileton redonis la edzino de la hispana ambasadoro en Ĉinio! Tiel Jariĉ kunveturis kun la hispana ambasadoro dum semajno. Tamen, kiam li atingis Varsovion, restis jam nur unu tago el la kongreso. Li ĉeestis nur la fermon, kaj kun larĝaj li portis la kongresan karton n-ro 5964 sur la brusto.

Notu bone

INTERNACIAJ EKSAMENOJ

En 1999, en 7 sesioj de la Internaciaj Eksamenoj de IEI/UEA (en Germa-

nio, Hispanio, Malagasio, Togolando kaj Usono) je elementa nivelo sukcesis 16 el la 34 aliĝintoj, dum mez-nivelo sukcese ekzameniĝis 15 el la 19 kandidatoj.

Informoj: sekretario Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard, Nederlando; ten.hagen.esperanto@wxs.nl. Detala regularo, konsiloj, specimenaj tekstoj: Gvidilo al la Internaciaj Eksamenoj de IEI/UEA (€3).

Reagoj



La kontribuoj aperantaj en ĉi tiu rubriko esprimas la opinion de siaj aŭtoroj, kaj la redakcio ne respondecas pri ili.

"Ĉu vi parolas eŭrope?"

Z. Tiŝlar (jan., p. 7) prave proponas Esperanton kiel lingvon de eŭropa identeco, skribante ke la lingvo-problemo en Eŭropo estas solvenda kiel problemo identigila, ne komunikila. Li demandas ĉu pli gravas teoria strebo al tuja tutmondeco de Esperanto aŭ laŭŝtupa progreso, unue al komuna lingvo de Eŭropo kaj nur poste al vera tutmondeco.

Esperantistoj ĝenerale ja aspiras tutmondecon. Tamen, ŝajnas al mi ke la formiĝanta Eŭropa Unio donas ununuran okazon al Esperanto fariĝi grandskala popola lingvo. Neniu alia organizaĵo iam ajn funkciis per 11 oficialaj laborlingvoj; sed mankas Eŭropa Lingvo! Kial la Brusela konstruaĵo kie mi, irlanda diplomato, ĉeestas kunvenojn, portas la nomon *Consilium* nur en la latina?

Mi forte subtenas la proponojn de Tiŝlar, sed kial ne fari pluan paŝon kaj doni al Esperanto la nomon "la Eŭropa Lingvo", almenaŭ en Eŭropo? ("Ĉu vi parolas eŭrope?") Tia elpaŝo bezonus komprenon de niaj ekster-eŭropaj samideanoj, sed mi

certas ke, vidante la gravecon por nia tuta afero, ili ĝin donus.

Seán Ó Riain · Irlando

Lingvo por "fortikaĵo Eŭropo"?



Tiŝlar proponas reklami Esperanton kiel EU-eŭropan "identeclingvon" anstataŭ kiel komunikilon.

Sed kia gajno, se oni repuŝas la mucidiĝintajn naciajn identecojn favore al pli moderna eŭropa nacia identeco (eble kombine kun etregionaj kaj malgrandetnaj identecoj, laŭ la etnocentrisma federalismo)? Ĉia identeco implicas malidentecon kun nesamgrupanoj. Kaj la sentata malidenteco kun alikontinentanoj estas problemo. Ĝi estas idea abutmento de la "fortikaĵo Eŭropo", kiu altigas la muregon ĉe sia periferio. Esperantistoj, kiel multegaj aliaj, havas pri tio rektan ŝpertan: samlingvanoj el malriĉaj landoj ofte restis forbaritaj de kongresoj en EU-Eŭropo. Dum la "fortikaĵo Eŭropo" estas fizika realaĵo, la oficialigo de Esperanto nur pro ĝia hipotezata "identeca" valoro

por Eŭropo estas kastelo en la nuboj.

Per la ideologio de eŭropa patriotismo, kiun Tiŝlar akcelas, ni riskus forpuŝi homojn kiuj volas pli egalecan kaj demokratian mondan ordon. Ĝuste tiajn homojn ni devus alparoli kaj konvinki, se la politika klimato iam tiel funde ŝanĝiĝus ke eblus eĉ pensi pri ĝeneraligo de socie sam-niveliga afero kiel Esperanto. Dume, ni riskus abomenigi Esperanton al la ĝenerala publiko, proponante ĝin al reg-instancoj kiel soci-teknikan manipulon.

Gary Mickle · Germanio

Frukto de la civilizo eŭropa

Estante dum jardekoj ĉiutaga uzanto de Esperanto kaj la angla (krom la gepatra japana), mi konsentas kun Tiŝlar ke E-o estu traktata kiel eŭropa identec-lingvo.

Ĉu azianoj fobiu la nocian kunligon de E-o kun Eŭropo? Ĉu ne-eŭropanoj dronu en la eterne ne-atinginda fantazio ke E-o en la longa tempokuro akiros "ne-eŭropan, tutmondan" karakteron?

Absurde. La fundamento de la lingvo restos senŝanĝe

eŭropa. Oni devas neniam trompi kaj trompiĝi, kvazaŭ Esperanto estus neŭtrale homa lingvo. La parolantoj de latinidaj lingvoj ekkomprenas E-on facile — male japanoj kaj koreoj. Ĉi tio tute ne estas plendo, nek ĵaluzo, sed simpla fakto-priskribo.

Ĉu Esperanto akiros decan lokon en la eŭropa civilizo, dependos de la klopodoj de ĉi ties anoj. Se iam entute E-o estos tie plene akceptita, tiu okazo nur markos la tagon anstataŭigi per E-o la anglan, francan, hispanan kaj rusan el la ses oficialaj lingvoj de UN; Esperanto, lingvo eŭropa, neniam devas rajti kompromiti la pozicion de lingvoj de aliaj civilizoj.

Kiel Tiŝlar prave argumentas, estas je la libera juĝo kaj elekto de la homoj de la aliaj civilizoj kigrade ili utiligos la fruktojn de la civilizo eŭropa.

Esperanto devas modeste nomiĝi eŭropa lingvo. Estus erara orgojlo se ĝi nomus sin neŭtrale homa mondlingvo, ignorante la klarajn limigojn de sia aparteno al la civilizo eŭropa.

Izumi Yukio, dumviva membro de UEA · Japanio

Li ĉeestis ankaŭ en la Roterdama UK (1988) kaj preparis veturon al Berlino pasintan jaron, sed terura kancero katenis lin al hospitala lito.

Kvankam Jariĉ estis nur simpla ĉina intelektulo, li diligente laboris por nia movado dum la tuta vivo. Liaj E-lernintoj troviĝas tra la tuta provinco, eĉ lando. Li estis membro de UEA kaj ILEI, vicprezidanto kaj kasisto de Hubei-a E-Asocio; li senparade klopodadis kaj oferis sin por la amikeco kaj

interkompreno inter la popoloj.

Sola libera UEA-membro

Dum la Kultura Revolucio li eble restis la sola individua membro de UEA en Popola Ĉinio — krom Armand Su, sed tiu estis fermita en prizono pro sia Esperanta agado. Jariĉ persistis korespondi kun fremdaj samideanoj, malgraŭ ke lia hejmo estis kelkfoje traserĉita, liaj libroj, fotoj kaj tajpilo konfiskitaj.

Post la faligo de la "kvarpersona bando", li ricevis kompenson de oficiala instanco: unu juanon.

Ĉi tiu teksto aperis, pli longa, en la beletra revuo *Penseo* (nov., dec. '99), legebla sub <http://www.crosswinds.net/~zfmao/penseo/>. Abonemuloj sin turnu al PENG Zhengming (301 Dong 3-2, Meiyuan Xiaoqu, Fujiapo, Wu-chang, CN-430070 Wuhan, Hubei, Ĉinio; dedhea@public.wh.hb.cn).

Kalendaro 2000

Kvankam ni laŭeble kontrolis la divers-fontajn informojn pri la menciitaj aranĝoj, ni ne povas garantii la fideindecon de ĉiu ero en ĉi tiu kalendaro. Informoj aperintaj pli frue ne nepre estas ripetataj. La sekva kalendaro aperos en la julia numero.

marto

- 24-29: **Kongreso de Franca Fervojista E-Asocio**, St-Mandrier (Jean Ripoche, 6, rue des Platanes, La Gautrie, FR-72230 Arnage; ☎/☎+33/2/43-21-16-39; ✉Jean.Ripoche@wanadoo.fr)
- 25-26: **Kuraci sin per plantoj**, KCE*, Svislando (gvidas Stano Marček)

aprilo

- 01-02: **11-a Kongreso de Valencio kaj Murcio**, Requena, Hispanio (Augusto Casquero, Ave. Burjasot, 29, A-31, ES-46009 València; ✉a-casquero@redestb.es)
- 01-02: **47-a Staĝo de Parolata E-o**, Strasburgo, Francio (Pol Denis, 5 Ch. de Blamecourt, FR-55000 Bar-le-Duc; ✉sopol.denis@wanadoo.fr; gvidas Claude Gacond)
- 01-05: **1-a E-Konferenco pri Ekonomio kaj Komerco**, Siano, Ĉinio (Ĉielismo Von, Xi'an-a E-Asocio, Jian-Gong-Lu 8, CN-710043 Xi'an; ☎/☎+86/29/223-29-52; ✉komerc@public.xa.sn.cn)
- 02-09: **Semajno de LSG** (Ligo de Samseksamaj Gee-istoj), Strasburgo, Francio (Johano; ☎+33/3/88-37-02-91)
- 07-09: **TAO-semajnfino kuira**, Guillaumes, Francio (Philippe Chavignon, M. F. du Plan, FR-06470 Guillaumes; ☎+33/4/93-05-51-98; ✉werpha.tao@wanadoo.fr)
- 07-09: **"Pri io kaj nenio"**, amuza kaj amika kunestado, Poprad*, Slovakio
- 09: **Lingva seminario**, Skokovy, Ĉeĥio (Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, CZ-29301 Mladá Boleslav; ☎+420/326/731-845)
- 11-15: **Pri pedagogio**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Claude Gacond)
- 13-23: **1-a Meksika Kongreso de AIS**, Celaya, Meksiko (Rubén Feldman-González, 120-A Rockwood Ave., MSC 40-716, Calexico CA 92231, Usono; ✉103163.3356@compuserve.com; http://www.ais.org.mx/Congreso/ia/iasmexico/)
- 14-17: **Zamenhofaj Kulturaj Tagoj**, Miercurea Ciuc, Rumanio (Jolanda Józsi, str. Patinoarului 12-A ap. 3, RO-4100 Miercurea Ciuc)
- 14-18: **7-a MIRO** (Marioneta Internacia Renkontiĝo), Bizovac, Kroatio (Zvonimir Andreis, KEJA,

- Mislavova 11/III, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/481-01-52; ✉ivex@beer.com; http://pubwww.srce.hr/keja/7aMIRO.htm)
- 16-22: **Seminario "Esperanto@Interreto"**, Stokholmo, Svedio (Håkan Lundberg, Fisksatra Torg 12, 4tr, SE-13341 Saltsjöbaden; ✉Hokan.Lundberg@telia.com; http://w1.871.telia.com/~u87101714/echei)
- 17-24: **16-a Printempa Semajno Internacia kaj 6-a Printempa Lernejo Internacia**, St. Andreasberg, Germanio (Wolfgang Bohr, J.-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; ☎+49/2641/4885; ☎2641/978-666; ✉psi@esperanto.de; http://www.esperanto.de/psi/2000; temo: "Eŭropo 2000 — Kunvivado de la generacioj oriente kaj okcidente")
- 18-22: **Praktikado de la lingvo**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Suzanne Bourot kaj Marie Malézieux)
- 19-25: **24-a Internacia Junulara Festivalo**, kun AIS-sesio, Cavallino, Italio (Manuel Giorgini,



- S. Polo 606, IT-30125 Venezia; ✉ijf.admin@esperanto.it; http://www.esperanto.it/ijf24/ijf24.html; temo: "Ĉu esti aŭ ne esti eŭropano?")
- 21-23: **Semajnfino "E-o en Appleby"**, kun Jar-kunveno de E-Asocio de Britio (Morecambe E-Klubo, p/a F. M. Jay, 141 Slyne Road, Bolton-le-Sands, Carnforth, Britio LA5 8AJ)
- 22-25: **55-a Kongreso de SAT-Amikaro**, Fouquières-lez-Lens, Francio (Michel Bouchez, 66, rue E. Zola, FR-62740 Fouquières-lez-Lens)
- 24-29: **Regiona Studenta Konferenco** de sekcio e-ologio kaj interlingvistiko, Vladivostoko, Ruslando (Aleksandr B. Titajev, Do vostrebovanija, RU-690600 Vladivostok; ✉oriento@mail.ru)
- 27 apr.-01 majo: **4-a Eŭrop-Uniona E-Kongreso**, Oostende, Belgio (Oostende 2000, Witte-Nonnenstr. 9A, BE-8400 Oostende; ✉oostende2000@esperanto.be; http://www.esperanto.be/fel/kun/4aeuk.html; temo: "Ekologio, ŝlosilo por la tria jarmilo")

- 28-30: **Seminario "La rolo de E-turismo por la proksimiĝo de la popoloj"**, Sofio, Bulgario (Dimitar Papazov, p. k. 9, BG-1303 Sofio; ☎+359/2/292-46-27; ☎873-847; ✉sid@geobiz.net)
- 28 apr.-03 majo: **30-a Tutpollanda Kongreso de E-istoj**, Krakovo, Pollando (Grażyna Maszczyńska-Góra, ul. Armii Krajowej 2/14, PL-30-150 Kraków)



- 29-30: **E-ologia kaj Didaktika Konferenco** de la Pola ILEI-sekcio kaj Internacia Renkontiĝo de Gelernantoj el "Interkulturo-klaso", Krakovo, Pollando (Lidia Ligęza, Bronowicka 51/2, PL-30-091 Kraków; ☎+48/12/637-60-81; ✉antobe@poczta.onet.pl)
- 29-30: **Omaĝo al Yvonne Martinot**, prelegaro, kaj Asembleo de Kultura Centro E-ista, KCE*, Svislando
- 29 apr.-01 majo: **59-a Hispana Kongreso de E-o**, San Sebastián de los Reyes ĉe Madrido (HEF, Rodríguez San Pedro 13-3º-7, ES-28015 Madrid; ☎/☎+34/914/468-079; ✉kongreso@esperanto-es.org; temo: "Tutmonda kulturo")
- 29 apr.-01 majo: **Interreto kaj E-o**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Yannick Dumoulin kaj Johano Rapley)
- 29 apr.-07 majo: **25-aj E-aj Tagoj**, kun Cseh-seminario "B", Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo*)

majo

- 01-09: **Aroma Jalto**, Ukrainio (Volodimir Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kiev 133; ☎+38/044/295-17-01; ✉ukrea@esperanto.nu)
- 05-07: **Printempa E-ista Renkontiĝo** en Altaj Tatroj, Poprad*, Slovakio
- 06-08: **Ludoj endomaj kaj subĉielaj**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Johano Rapley kaj Gilena Tilleux)
- 13: **Malferma Tago**, CO de UEA (vidu anoncon sur p. 59)

junio

- 13-19: **52-a Internacia Fervojista Kongreso**, Budapeŝto, Hungario (LKK, Pf. 7, HU-1378 Budapest)
- 19-21: **SATEB-Konferenco**, Britio (Anne Johnson, 42 Beresford Rd, Islington, London, N5 2HZ)
- 19-21: **49-a Kongreso de E-Ligo por Norda Ameriko kaj Nord-Amerika Kongreso de E-o**, Atlanta, Georgio, Usono (ELNA, P. O. B. 1129, El Cerrito CA 94530; ☎+1/510/653-09-98; ✉653-14680; ✉elna@esperanto-usa.org, <http://www.esperanto-usa.org>)
- 20-21: **Jarkongreso de Sveda E-Federacio**, Helsingborg (SEF, Vikingagatan, SE-11342 Stockholm; ☎+46/8/340-800; ✉340-810; ✉sef@esperanto.se)
- 22-28: **Tagoj de Slava Kulturo**, Vladivostoko, Ruslando (Aleksandr B. Titajev, Do vostrebovanija, RU-690600 Vladivostok; ✉oriento@mail.ru)
- 25-28: **12-aj E-aj Tagoj**, Staszów, Pollando (Kulturdomo, Parkowa 6, PL-28-200 Staszów; ☎+48/15/864-41-12)
- 26-28: **95-a Skota Kongreso de E-o**, Leith, Skotlando, Britio (Ed Robertson, 52 Easter Drylaw View, Edinburgh EH4 2QP; ☎+44/131/332-98-03; ✉ERobert52@aol.com)
- 27: **4-a Kongreso de Kroataj E-istoj**, Djurdjevac, Kroatio (KEL, Kneza Mislava 11, HR-10000



KVARA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

- Zagreb; ☎+385/1/481-01-52; ✉481-70-67; ✉esperanto@zg.tel)
- 27-28: **Ĉina semajnfino**, KCE*, Svislando
- 27-28: **Seminario pri apliko de E-o en scienco kaj tekniko**, Kubo (KEA, Apdo 5120, CU-10500 La Habana; ✉kubesp@mail.infocom.etecs.cu)
- 30 majo-01 jun.: **19-a Internacia Literatura Forumo**, kun Ĝenerala Asembleo de Esperanta PEN-Centro, Vraca, Bulgario (LF, PK 26, BG-3000 Vraca; ✉lofo@usa.net; temo: "Nia gazetaro fronte al la telematika defio: kiuj ŝancoj, kiuj riskoj por la E-kulturo?")
- 30 majo-06 jun.: **Staĝo de E-o**, Agde ĉe Montpellier, Francio (C. B. E., 9, rue G. Picot, FR-34500 Béziers; ✉croget@wanadoo.fr)
- 30 majo-11 jun.: **22-a Ĉebalta E-ista Printempo**, Mielno, Pollando (Pola E-Asocio, Box 30, 75-016 Koszalin-1; ☎+48/94/340-45-63)
- 31 majo-04 jun.: **94-a Germana Katolika Foiro**, kun E-partopreno, Hamburgo (Ulrich Matthias, Ohmstr. 13, DE-65199 Wiesbaden; ☎+49/611/466-712; ✉Ulrich.Matthias@t-online.de)



- 01-04: **Botaniko tra la regiona flaŭro**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Ru Bossong kaj José Vinck)
- 01-04: **1-a Aktivula Semajno de Unuiĝo Franca por E-o kaj Membrokunveno**, Boulouris (UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; ☎+33/1/42-78-68-86; ✉42-78-08-47)
- 03-04: **"Abritus"** kun literatura konkurso EKRA, Razgrad, Bulgario (E-Kulturdomo "D-ro Ivan Kirčev", str. Sv. Kliment EK-3, BG-7200 Razgrad; ☎+359/84/32-694)
- 09-11: **20-a Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj** kun uzo de E-o, Toruń, Pollando (Etnografia Muzeo, str. Waly Gen. Sikorskiego 19, PL-87-100 Toruń; ✉48/56/622-89-44)
- 09-12: **Pentekosta Renkontiĝo**, Hoeven, Nederlando (Fabien van Mook, Molenstraat 46C, NL-5701 KG Helmond; ☎/✉+31/492/521-991; ✉nej@dds.nl, <http://huizen.dds.nl/~nej/p-r.html>; temo: "Translandima migrado: kiom vere facilas?")
- 09-12: **Pentekosta E-renkontiĝo kun Cseh-seminario "A"** kaj Baza Cseh-kurso, Herzberg, Germanio (Esp.-Gesellschaft Südharz, Grubenhagenstr. 8, DE-37412 Herzberg)
- 09-12: **5-a Hansa E-Tago**, Kiel, Germanio (Esperanto-Kiel, Johannesstr. 54, DE-24143 Kiel; ☎/✉+49/431/737-788; temo: "Literaturo ĉirkaŭ la Balta Maro")
- 10-12: **E-staĝo**, Préfaillies, Francio (Hélène Vincent, 3, rue B. Cendrars, FR-44100 Nantes; ☎+33/2/40-43-92-42)
- 11-15: **22-a Sanmarineca Universitata Sesio** de AIS, Hradec Králové, Ĉeĥio (Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschild-Weg 6/319, DE-37077 Göttingen, Germanio; ✉blewo1@hrz.uni-paderborn.de, <http://www.forst.tu-muenchen.de/OTHERS/AIS/arangxo/sus/sus22/index.html>)
- 14-21: **Internacia Ferie-Semajno de TANEF** (naturamika), Ubedissen, Germanio (Karin Lencki, Niedersachsenweg 9b, DE-21244 Buchholz)

- 16-18: **Landa E-Renkontiĝo**, Szolnok, Hungario (Gyuláné Kovács, Botond u. 6, HU-5000 Szolnok)
- 22-25: **3-a Rendevuo pri E-o kiel labor-lingvo ĉe la kampo de la sano**, Ribeirão Preto, Brazilo (Inst. Homeopatia, Rua A. Brasileira 1418, BR-14015-150 Ribeirão Preto – SP; ☎+55/16/636-88-89; ✉636-50-65; ✉lamasson@netsite.com.br, <http://www.netsite.com.br/lamasson>)
- 22-25: **Cseh-seminario "A"**, Hago, Nederlando (IEI*)
- 24-25: **La familio Zamenhof, KCE***, Svislando (prelegas Zofia Banet-Fornalowa)
- 25: **Pikniko de APE**, Mariembourg, Belgio (Marcel Delforge, 16, rue des Glacières, BE-6001 Charleroi; ☎/✉+32/71/431-413; ✉mdel6335@euronet.be)
- 26 jun.-14 jul.: **Norda Amerika Somera E-Kursaro**, San-Francisko, Usono (Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512; ☎+1/360/754-45-63; ✉eddyellen@aol.com, <http://esperanto.org/nask/>; instruas Grant Goodall, Spomenka Štimec, Dennis Keefe, Reza Kheir-Khah)
- 30 jun.-05 jul.: **Solidaraj Tagoj**, Saint-Chamond ĉe Liono, Francio (JEFO, B. P. 3019, FR-69394 Lyon Cedex 03, ☎/✉+33/4/72-36-07-14; ✉festo@esperanto.org, <http://perso.wanadoo.fr/esperanto/2000-jun.htm>)

julio

- 01-07: **Studsemajno pri ekologio kaj kompoŝtado**, Londerzeel, Belgio (FEJA, Frankrijk-lei 140, BE-2000 Antwerpen; ✉lode@fel.esperanto.be, <http://www.esperanto.be/jeanpain.html>)
- 02-08: **36-aj Baltaj E-Tagoj**, Tallinn, Estonio (Ahto Siimson, P. k. 3143, EE-0090 Tallinn; ☎/✉+372/641-90-70; ✉ahto.siimson@mail.ee)
- 03-07: **E-studsemajno**, Valamo, Finnlando (EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki; ✉laakju@koti.tpo.fi)
- 03-09: **Korusa staĝo**, Tuluzo, Francio (vidu 05-09 jul.)

* ADRESARO

Grésillon: Château, FR-49150 Baugé; Francio; ☎+33/2/41-89-10-34; ✉esperanto.en.vendomois@mail.dotcom.fr

HEA: Hungaria E-Asocio, pf. 193., HU-1368 Budapest, Hungario; ☎+36/1/268-03-06; ✉268-03-31; ✉esperantohea@matavnet.hu

IEI: Internacia E-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; ☎+31/70/556-677; ✉358-44-22; ✉cseh@iei.nl

KCE: Kultura Centro E-ista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; ☎/✉+41/32/926-74-07; ✉kce.esperanto@bluewin.ch

Kvinpetalo: Rue du Lavoir, FR-86410 Boursesse, Francio; ☎/✉+33/5/49-42-80-74; ✉rapley@club-internet.fr, <http://hometown.aol.com/yannickdum/>

Monda Turismo: str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando; ☎/✉+48/52/341-57-44; ✉andreo@rubikon.net.pl

Orbis Pictus: Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste, Italio; ☎/✉+39/040/767-875; ✉orbispictus@iol.it, <http://osiek.org/iek/motovun2000.html>

Poprad: Esperanto – Regiona Societo, Sobotské nám. 36, SK-05801 Poprad, Slovakio; ☎/✉+421/92/776-93-02; ✉milanzvara@hotmail.com

- 03-09: **Ivanova E-Renkontiĝo**, Ruslando (Irina Galicina, Kudrjasova D. 82-A, RU-153009 Ivanovo; ☎+7/0932/230-116; ✉irga@interline.ivanovo.ru, <http://ametisto.chat.ru/aligilo>)
- 05-09: **Kultura Arta Festivalo de E-o (KAFFE)**, Tuluzo, Francio (Eurokka, FR-31450 Donnevill; ☎+33/5/61-81-95-65; ✉34-66-04-15; ✉eurokka@esperanto.org, <http://perso.wanadoo.fr/kultur.art.festival.eo>)
- 07-11: **Aktorarto kaj aktorado kaj Inicido kaj praktiko de joko**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Paul Gubbins, Colin Simmonds, resp. Arlette Plutniak)
- 08: **4-a Festivalo de Videofilmoj en E-o**, Maribor, Slovenio (E-Societo, Besednjakova 1, SI-62000 Maribor; limdato por konkursaj: 30 jun.)
- 10-13: **Ekologia kaj liberecana tendumado**, Beauville, Francio (Le Kiosque – "Lingvo Esperanto 64", 15, rue de la République, FR-64000 Pau; ☎+33/5/59-84-11-09)
- 10-15: **Mediterranea Kultura E-Semajno**, Valencio, Hispanio (Augusto Casquero, Avenida Burjasot, 29, A-31, ES-46009 València; ✉a-casquero@redestb.es)
- 10-17: **Arkeologia laborbrigado**, Tuluzo, Francio (Claude Fressonnet, Canterate, FR-09600 Montbel; ☎+33/5/61/681-744)
- 12-16: **36-a Brazila E-Kongreso** Petrópolis, Brazilo (Brazila E-Ligo, C. P. 3625, BR-70084-970 Brasília - DF; ☎+55/61/226-12-96; ✉226-44-46; ✉bel@bmet.com.br, <http://www.bmet.com.br/bel/bel>; temo: "Esenco kaj estonteco de la ideo de Lingvo Internacia. Ĉu io aldonenda al la centjara tezo de Zamenhof?")
- 14-22: **4-a Somera E-Lernejo**, Teslić, Serba Resp., Bosnio-Hercegovino (E-Ligo de SR, P.K. 335, BA-78000 Banja Luka; ☎+387/51/301-666; ✉305-452; ✉mvrhovac@urcbl.urc.bl.ac.yu)
- 15-21: **34-a ILEI-Konferenco kaj Cseh-seminario "C"**, Kvinpetalo*, Francio (Jennifer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122, Aŭstralio; ✉esperanto@education.monash.edu.au; temo: "Lingvo-lernado serve al interkultura edukado")
- 15-21: **Diversgradaj E-kursoj kaj E-kantado**, Grésillon*, Francio (gvidas Juanita Turbillon, Christian Rivière, Paul Signoret, resp. Monique Kimel)
- 15-21: **Internacia E-Konferenco de OSIEK**, Motovun, Istrio, Kroatio (Orbis Pictus*; temo: "Multkultureco, multlingveco kaj kunvivado"; post-konferencaj ekskursoj 21-24)
- 15-22: **6-aj Someraj kursoj**, Motovun, Istrio, Kroatio (Orbis Pictus*; instruas Zlatko Tišljak kaj Georgo Handzlik)



- 15-23: **73-a SAT-kongreso**, Moskvo, Ruslando (SAT, RU-105318 Moskva, ab. ja. 57; ☎+7/095/369-42-20; ✉nikolao@orc.ru, <http://www.multimania.com/satesperanto/KongMos.html>)
- 16-28: **15-a Somera Kurso** kvarnivela, ankaŭ por infanoj; Lesjöfors, Svedio (Esp-Garden, SE-68096 Lesjöfors; ☎+46/590/30-909)
- 17-23: **7-a Kultura E-Festivalo**, Helsinko, Finnlando (KEF 2000, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki; ✉kef2000@esperanto.fi, <http://www.esperanto.fi/kef2000.html>)
- 18-20: **1-a Nacia E-Kongreso** de Malagasa E-Unuiĝo, Antanarivo, Malagasio (Justine Ralalarisoa, Lot. II C 72 FD Manjakaray, MG-101 Antanarivo)
- 18-23: **Staĝo pri joko**, KCE*, Svislando (gvidas Fernando Vurpillot)
- 22-24: **Seminario "Tutmondiĝo kaj la arabaj landoj"**, Amano, Jordanio (CO de UEA, vidu feb., p. 26)
- 22-24: **5-a E-Renkontiĝo**, Pale, Serba Resp., Bosnio-Hercegovino (E-Ligo de SR, P.K. 335, BA-78000 Banja Luka; ☎+387/51/301-666; ✉305-452; ✉mvrhovac@urcbl.urc.bl.ac.yu)
- 22-29: **19-a Katolika E-Tendaro, 3-a Konferenco de IKUEJ**, Sebranice, Ĉeĥio (Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-75127 Penčice; ✉msvacek@iol.cz)
- 24-29: **Diversgradaj E-kursoj, prezento de la tezo La internacia movado de la e-istaj laboristoj 1918-1939 kaj Teatro**, Grésillon*, Francio (gvidas resp. Przemek Grzybowski kaj Ferdi Vince; Anne-Sophie Markov; Sylvie Bonnet)



- 25 jul.-01 aŭg.: **85-a Universala Kongreso de E-o**, Tel-Avivo, Israelo (CO de UEA, adreso en la kolofono; temo: "Lingvo kaj kulturo de paco")
- 25 jul.-01 aŭg.: **Cseh-Seminario "A"**, Tel-Avivo, Israelo (IEI*)
- 25 jul.-01 aŭg.: **Internacia Infana Kongreseto**, Hadasim, Israelo (Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd; ☎+36/1/452-37-37; ✉452-37-10; ✉stefan.macgill@galamb.net)
- 27-02 aŭg.: **13-a Internacia Junulara Semajno**, Hungario (HEJ, pk. 87, HU-1675 Budapest; ✉pandan@mail.matav.hu)
- 31 jul.-05 aŭg.: **Diversgradaj E-kursoj kaj Prelegoj diverstemaj**, Grésillon*, Francio (gvidas Przemek Grzybowski kaj Odile Masseron; prelegas Georges Lagrange)

aŭgusto

- 01-06: **Kiel reklami esperanton?**, KCE*, Svislando
- 02-13: **Memzorga Lagumado**, Délegyháza, Hun-

- gario (László Garamvölgyi, Arany János út 47, HU-1221 Budapest; ☎+36/1/228-35-10; ✉laca@Esperanto.nu, <http://www.yi.com/home/GaramvolgyiLaszlo/mela/mela.html>)
- 03-10: **Skota Semajno junulara**, Bridge of Orchy, Skotlando (Duncan C. Thomson, 2/1, 68 Roslea Drive, Glasgow, Scotland, Britio G31 2QS; ✉thom-ci0@wpmail.paisley.ac.uk)
- 04-17: **Somera E-Lernejo**, Poprad*, Slovakio



- 05-12: **56-a Internacia Junulara Kongreso kaj 19-a Komuna Seminario**, Honkongo, Ĉinio (LKK de IJK, P. O. K. 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio; ✉cel@china-report.com; billmak@ibm.net, <http://www.esperanto.org/ijk2000>; temo: "La transiro al tutmondismo – Tutglobismo en la 21-a jarcento")
- 05-12: **66-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj**, Plovdiv, Bulgario (Dančo Dančev, Bulv. Marica 6, BG-4002 Plovdiv; temo: "Kongreso inter du jarcentoj")
- 05-12: **Hungaria E-ista Semajno** (Espertur, Tátra u. 4, HU-1136 Budapest, Hungario; ☎+36/1/268-03-06; ✉268-03-31; ✉esperantohea@matavnet.hu)
- 05-12: **50-a Kongreso de Kristana E-ista Ligo Internacia**, Janské Lázně, Ĉeĥio (Pavel Polnický, Lesní 150/VI, CZ-29001 Poděbrady; ☎+420/324/615-651; ✉610-812)
- 05-12: **22-a Renkontiĝo de E-lingvaj Familioj**, Vác, Hungario (István Bagó, Kert u. 17, HU-9081 Győrújbarát; ✉bago@kern.hu)
- 06-12: **E-semajno pri Martinus-Kosmologio**, Klint, Danio (Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago; ☎+45/38-34-62-80; ✉38-34-61-80; ✉institut@martinus.dk)
- 07-12: **Diversgradaj E-kursoj kaj Pec-kudrado**, Grésillon*, Francio (gvidas Przemek Grzybowski, Marie Malézieux, Nina Korjnevskaja)
- 08-12: **Studo de francingvaj tekstoj per E-o kaj Preparado al la skriba parto de Altaj Studoj**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Janine Dumoulin resp. Georges Lagrange)
- 08-13: **23-a Somera Familia/Feria Tendaro**, Germanio (Werner Pfennig, Uns Hüsung 29/1104, DE-17034 Neubrandenburg)
- 08-13 kaj 15-20: **3-a Plurnivela Internacia Kursaro**, KCE*, Svislando (kun Stano Marček, Ljubomir Trifončovski, Stefan MacGill, Giorgio Silfer)
- 10-20: **Junularaj Mondaj Tagoj** kun e-ista partopreno, Venecio (10-14) kaj Romo (15-20), Italio (Gianluca Serbo, via Nazario Sauro 23, IT-36100 Vicenza, ☎+39/04/44-51-35-74; ✉giserbo@tin.it, <http://digilander.iol.it/esperantovenezia/JMT.html>)



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

estas via asocio.

Kiel membro de UEA vi apartenas
al komunumo de esperantistoj
en 120 landoj.

www.uea.org

KOTIZTABELO DE UEA POR 2000

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2000.

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	14	34	85	51	31	170
Aŭstrio/ŝilingo	105	265	660	420	250	1320
Belgio/franko	310	775	1940	1235	740	3880
Britio/pundo	5	14	34	21	13	68
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	630	380	2100
Danio/krono	55	140	355	230	135	710
<i>Eŭro-landoj</i>	8	19	48	31	18	96
Finnlando/marko	45	115	285	180	110	570
Francio/franko	50	125	315	200	120	630
Germanio/marko	15	38	94	59	36	188
Greklando/drakmo	1700	4300	10700	6800	4100	21400
Hispanio/peseto	1100	2700	6800	4300	2600	13600
Hungario/forinto	1100	2800	7100	4300	2600	14200
Irlando/pundo	6	15	37,75	24	14	75,50
Islando/eŭro	8	19	48	29	17	96
Israelo/eŭro	6	16	39	23	14	78
Italio/liro	15000	37000	93000	59000	36000	186000
Japanio/eno	1000	2600	6500	3900	2300	13000
Kanado/dolaro	13	33	82	49	29	164
Nederlando/guldeno	17,63	41,87	105,78	68,32	39,67	211,56
Norvegio/krono	65	165	415	250	150	830
Nov-Zelando/dolaro	16	40	100	60	36	200
Portugalia/eskudo	1200	3000	7500	4800	2900	15000
Slovakio/krono	180	460	1150	690	410	2300
Svedio/krono	70	170	430	275	165	860
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	9	23	57	34	20	114
TARIFO A/eŭro	5	13	32	19	11	64
TARIFO B/eŭro	4	10	24	14	9	48

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio, Liĥtenŝtejno laŭ Svislando.

TARIFO A: Honkongo, Korea Resp., Malto, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG:

Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T):

Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T):

Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM:

Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA:

Simple abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto:

Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ:

Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT:

Parrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

JES, mi volas membriĝi en UEA!

Mi membriĝas por la jaro 20____ en kategorio: ☐ MG / ☐ MJ / ☐ MJ-T / ☐ MA / ☐ MA-T / ☐ DM.

Mi volas aboni la revuojn: ☐ SA (*Esperanto*) / ☐ Kto (*Kontakto*).

Mi volas aldone subteni UEA/TEJO pagante por: ☐ SZ (Societo Zamenhof) / ☐ PT (Patrono de TEJO).

Mi pagas la sumon de _____ (bv. indiki valuton).

Mi krome pagas la sumon de _____ (bv. indiki valuton) por la persono indikita dorsflanke.

Pagmanieroj:

☐ Mi pagas al la kotizperanto en mia lando (vidu p. 32-35 en Jarlibro 1999).

☐ Bv. debeti mian UEA-konton, kie estas sufiĉa bonhavo.

☐ Mi pagas al poŝta konto de UEA (por pago al konto ekster via lando bv. aldoni 5 eŭrojn / 11 guldenojn).

☐ Bv. debeti mian American Express / Visa / Eurocard / Mastercard / Access / JCB:

____ valida ĝis: ____ / ____.

NOMO _____ UEA-KODO (se konata) _____

ADRESO _____

_____ NASKIĜJARO _____

DATO _____ SUBSKRIBO _____

Poŝtaj kontoj de UEA: Nederlando 378964; Belgio: 000-1631831-97; Germanio (Köln) 3182 91 509 BLZ 370 100 50;
Svedio 74374-0; Svislando (Bulle) 12-2310-0

Mi (nomo) _____ donacas:

- membrecon por la jaro 20____ en kategorio:
☐ MG / ☐ MJ / ☐ MJ-T / ☐ MA / ☐ MA-T / ☐ DM
- abonon al la revuoj:
☐ SA (*Esperanto*) / ☐ Kto (*Kontakto*)

al:

NOMO _____ UEA-KODO (se konata) _____

ADRESO _____

_____ NASKIĜJARO _____

Mi ne (re)membriĝas, ĉar: _____

- 12-18: **40-a Internacia Somerlernejo**, Barlaston, Britio (Derek Tatton, Wedgwood Memorial College, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG; wedgwood.college@staffordshire.gov.uk)
- 13-20: **4-a Junulara Ekumena E-Tendaro**, Taizé, Francio (Bernhard Eichkorn, Romäusing 20, DE-78050 Villingen, Bernhard.Eichkorn@esperanto.de, <http://home.t-online.de/home/b.eichkorn/JET2000.htm>)
- 13-20: **Turisma Semajno**, Poprad*, Slovakio
- 14-19: **Diversgradaj E-kursoj kaj Jogo**, Gréssillon*, Francio (gvidas Juanita Turbillon kaj Helga Rapley, resp. Rose-Marie Laveau)
- 15-20: **Azia E-Renkontiĝo AERO 2000**, "En la koro de la Granda Silka Vojo", sub UEA-aŭspicio, Samarkand, Uzbekio (Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Pk. 76, UZ-703000 Samarkand; +7/3662/333-971 ["por S-ro Anatoli Ionesov"]; andrey@church.samuni.silk.org)
- 16-19: **De Zamenhof al Piĉ: literaturo kiel evolugigilo de nia lingvo**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Chris Declerck)
- 16-22: **16-a Internacia Simpozio pri E-turismo**, Budapeŝto, Hungario (Movilo, Soroksári út 117D, HU-1095 Budapeŝto; +36/1/378-27-93)
- 17-22: **3-a Eŭropa E-Festivalo**, Budapeŝto, Hungario (HEA*)
- 17-24: **5-a Internacia Arkeologia Laborbrigado**, Blera, Italio (Pier Luigi Cinquantini, via Dante 2, IT-01010 Blera; +39/0761/479-503; poinqua@tin.it, <http://space.tin.it/lo/pcinquan>)
- 19-20: **32-a Korea Kongreso de E-o**, Pusan, Koreio (KEA, 1601 Kangbyon Hanshin Core B/D, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul — 121-703; pusanesperanto@hotmail.com)
- 19-26: **4-a Pluezekia E-Renkontiĝo kun Hor-kanta ŝtaĝo**, Plouézec, Francio (Roger Eon, 5 Kervilin Izelan, FR-22470 Plouézec; +33/2/96-22-77-17; esperanto.22@libertysurf.fr, <http://esperanto.tregor.net>; instruas Atilio Orellana Rojas, Sabine Trenner, Dennis Keefe kaj Jean-Pierre Ducloyer; ĥor-estras Françoise Provost)
- 21-27: **Kafoklaĉa Internacia Somera Renkontiĝo**, Marburg, Germanio (MEG, Afföllerstr. 19, DE-35039 Marburg/Lahn; kiso@esperanto.nu)
- 24: **3-a Hoverlano**, Karpatoj, Ukrainio (Jaroslav Zaharija, Ĥmelnickij str. 82/4-8, UA-284006 Ivano-Frankivsk 6; +38/0342/62-241)



- 26-30: **69-a Italala Kongreso de E-o**, Casalecchio di Reno ĉe Bolonjo, Italio (Gruppo A. Tellini, via Miramonte 14, IT-40124 Bologna; +39/51/644-66-75; beg.Tellini1912@esperanto.nu)

- 26 aŭg.-02 sep.: **26-a Internacia Semajno ĉe Mediteraneo**, kun Cseh-seminario "B", Sète ĉe Montpellier, Francio (Yvette Vienne, 5, rue Docteur Roux, FR-34090 Montpellier; +33/4/67-54-15-43; yvienne@netcourrier.com)
- 28 aŭg.-20 dec.: **Tutsemestra kurso**, 22 horoj semajne, Lesjöfors, Svedio (Karlskoga Popola Altlernejo, SE-69124 Karlskoga; +46/586/646-00; +46/646-22; lars.forsman@fhsk.karlskoga.se)

septembro

- 01-05: **Astronomio: inicado kaj praktiko**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Patrick Lagrange)



- 01-09: **TEJO-seminario**, Varna, Bulgario (Aleksandar Šivarov, p.k. 405, BG-9000 Varna; +359/52/246-941; +246-326; a_shivarov@mailroom.com; TEJO-Oficejo: tejo-oficejo@wxs.nl; temo: "Balkana junulara kunlaboro por kulturo de paco")
- 01-15: **5-a Internacia E-Feriado**, Pollando (Pola E-Asocio, ul. Sw. Kingi 6, PL-34-450 Krościenko n. D.; +48/18/262-31-48)
- 06-13 kaj 13-19: **Intensa lingvokurso**, Agárd, Hungario (HEA*)
- 07-10: **Mikologia Seminario**, Poprad*, Slovakio
- 08-13: **La recenzo-arto en E-o**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Ed Borsboom)
- 22 sep.-01 okt.: **23-a Sanmarineca Universitata Sesio** de AIS, Sibiu, Rumanio (ais@athena.sibiu.ro, <http://www.forst.tu-muenchen.de/OTHERS/AIS/arangxo/sus/sus23/index.html>)
- 23 sep.-01 okt.: **26-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kaj Cseh-seminario "B"**, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo*)
- 24-29: **5-a Sesio de Interlingvistikaj Studoj**, Poznań, Pollando (Lingvistika Instituto, UAM, Międzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznań; +48/61/861-85-72; ikoutny@amu.edu.pl)
- 29 sep.-01 okt.: **16-aj Artaj Konfrontoj en E-o kun oratora konkurso**, Poznań, Pollando (Paweł Janowczyk, ul. Zawady 2/7, PL-61-002 Poznań; temo: "Ĉu E-o estas bezonata?")
- 29 sep.-01 okt.: **Nord-Okcidenta Regiona E-Konferenco**, Saanichton, Kanado (Wally G. Du Temple, 765 Braemar Ave., North Saanich B.C., V8L 5G5; dutemple@islandnet.com)
- 29 sep.-02 okt.: **Internacia Amikeca Renkontiĝo**, Aylesford, Britio (Anica Page, 37 Bullfinch Close, Riverhead, Sevenoaks, Kent TN13 2BB)
- 30 sep.-07 okt.: **8-a Internacia E-Semajno de Kulturo kaj Turismo kaj Baza Cseh-kurso**, Blanes, Katalunio, Hispanio (HFEA, Apdo 15027, ES-

08080 Barcelona; +34/9/37-27-50-21; +37-83-65-11; luis_serrano@mixmail.com)

oktobro

- 07: **Ago-Tago** (CO de UEA)
- 07-09: **7-a Internacia Semajnfino E-ista**, Okemo, Vermonto, Usono (ESK 2000, 6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, Qu. H2G 2R8 Kanado; +1/514/272-01-51; esperanto@sympatico.ca, <http://www3.sympatico.ca/esperanto/okemo.htm>)
- 13-15: **87-a Japana E-kongreso**, Kumamoto, Japanio (JEI, Waseda-mati 12-3, Sinzyukuku, Tōkyō-to 162; +81/3/32-03-45-81; +32-03-45-82; jei@mre.biglobe.ne.jp)
- 26-30: **Praktikado de la lingvo**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Nina Korjencevskaja)

novembro

- 01-04: **Rusa semajno**, Kvinpetalo*. Francio (gvidas Nina Korjencevskaja)
- 04-05: **11-a Kongreso de UkrEA**, Kievo, Ukrainio (Volodimir Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kiev 133; +38/044/295-17-01; ukrea@esperanto.nu)
- 10-12: **KAEST 2000**, Kolokvo "Aplikoj de E-o en scienco kaj tekniko", sub aŭspicioj de UEA, Prago, Ĉeĥio (KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, chrdle@kava-pech.cz; temo: "Ekonomio sojle al la tria jarmilo")
- 25: **2-a Esperanta Filmfestivalo**, Bratislava, Slovakio (Pavol Kaščák, Vážska 21, SK-82107 Bratislava; esperanto@nextra.sk, <http://www.home.sk/www/esperanto/informoj.htm>)

decembro


- 27 dec.-03 jan.: **17-a Internacia Festivalo**, Trier, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein; +49/5624/8007; HDP@internacia-festivalo.de, <http://www.internacia-festivalo.de>; temo: "E-o kaj infanoj")
- 27 dec.-03 jan.: **44-a Internacia Seminario**, Germanio (GEJ, Grelstr. 36, DE-10409 Berlin +49/30/42-85-78-99; bero@esperanto.de, <http://www.esperanto.de/is/2000/is00kf.htm>)

2001, julio

- 14-20: **74-a Kongreso de SAT**, Nagykanizsa, Hungario (Tibor Szabadi, Pf. 66, HU-8800 Nagykanizsa; esp.sz.tibor@sienet.hu)
- 21-28: **86-a Universala Kongreso de E-o**, Zagrebo, Kroatio (CO de UEA, adreso en la kolofono; temo: "Kulturo de dialogo - dialogo inter kulturoj")

2002, julio

- 87-a Universala Kongreso de E-o**, Fortaleza, Brazilo (CO de UEA, adreso en la kolofono)




Recenzoj

Vortaro

Pri Eŭropo konstruata

ABC de la Eŭropa Unio; Enkonduko en la eŭropan juron. María Rafaela Uruña Álvarez. Santiago: Universidade de Santiago de Compostela, 1997. 109p. 24cm. Kun fotoj. Studkajero por la Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj per Esperanto. € 10,80. **Eŭro. Ecoj kaj sekvoj por ĉiuj.** Marc Vanden Bempt. Leuven: Esperanto 2000 — Flandra E-Ligo, 1997. 52p. 21cm. € 3,60.

De duona jarcento daŭras la progresado al unuiĝinta Eŭropo, foje malrapide kaj heziteme, foje per grandegaj paŝoj. Profesoro pri internaciaj publika juro kaj rilatoj ĉe la Universitato de Valladolid, Uruña Álvarez donas sufiĉe detalan enkondukon en la rapide evoluantan eŭropan juron. Ŝi opinias ke EU “montriĝas kiel vojo al unueco kaj estiel novstila



Internacia Organizo, ĉiĉfoje supernacia, (...) en momento kiam la naciismoj refloras kaj la ŝtatoj pli gardas sian suverenecon” (p. 5), kaj ke temas pri “plu konstruata, ankoraŭ ne elkonstruita Eŭropo”. Ŝi certe pravas pri tio, kaj mia opinio ni tro ofte ne konscias la avangardecon de la tuta eŭropa ideo.

Al la ses ĉapitroj (enkonduko al historio kaj celoj de EU; ĝiaj organoj; komunumaj politikoj; komunuma juro; eksteraj rilatoj; politika unio per reformo de la institucioj) kaj konkludoj aldoniĝas statistikoj, interesaj fotoj kaj la teksto kaj muziko de la eŭropa himno *Odo al ĝojo*. (Kial ne kanti ĝin pli ofte en niaj kongresoj en Eŭropo?) Tiu lasta laŭ mi ege gravas, ĉar ĝi alproksimigas la komunan eŭropan senton al la plimulto de eŭropanoj, pli malfermita al emocioj ol al racia argumentado. Punkto tro ofte neglektata, kaj ne nur de la Esperanto-movado.

Manko en la libro sekvas ĝuste el la rapida evoluo de EU: jam necesus ĝisdatigi ĝin, ekz. priskribante la efikon de la Traktato de Amsterdamo. Sed ĝi estas tre utila verko, kiun mi forte rekomendas al ĉiuj eŭropemuloj.

En 1994 iu bavaria politikisto diris ke komuna eŭropa mono estus “Esperanto-mono”! Intertempe li malaperis el la politiko, dum tiu “Esperanto-mono”, la eŭro, jam ekzistas kaj post du jaroj estos en niaj poŝoj. El la popola vidpunkto, la eŭro estas unu el la pli praktikaj sekvoj dum la procezo de eŭropa integriĝo; estas do bone vidi en E-o tiom interesan pritrakton pri ĝi kiel la verko de Vanden Bempt, projekto-gvidanto pri enkonduko de la eŭro en granda belga asekura kompanio. Li detale priskribas ĉiufankajn aspektojn de la eŭro, de ĝia historio kaj evoluo el la ekuo, tra konsidero de la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la Ekonomia kaj Mona Unuiĝo, ĝis tre praktikaj konsideroj pri la transiro al eŭro ĉe kompanioj kaj privatuloj kaj ĝis la formo de la novaj monbiletoj. Sur ĉi tiuj okulfrapas la manko de eĉ unu vorto krom *eŭro*. Lingvojn havas Eŭropo, sed ĝi ne havas lingvon, kaj ĝi ne havos se Esperanto ne kapablos ludi tiun rolon.

Jen do valora libro, havenda por ĉiu kiu volas bone kompreni la grandan monan revolucion nun okazantan en Eŭropo.

Ne ligita al unu nacio, eŭro fariĝas identigilo por ĉiuj EU-civitanoj. Sed la fakta nuntempa lingva evoluo en EU, al komuna uzado de la angla, estas kvazaŭ EU adoptus kiel komunan monon la germanan markon aŭ la usonan dolaron.

Eŭropa mono: jes, eŭropa lingvo: ne?

Seán Ó Riain · Irlando

Muziko

Eko de Solo-skolo?

PoLimoRFiA ARKiTeKniA. Solotronik. Donneville: Vinilkosmo, 1998. Kompakta disko. 29 min. € 15,00.

Post kelkaj sonkasedoj, jen la unua kompaktdisko de Solotronik (Edu Vargas, konata ankaŭ kiel “Solo”). Kompreneble, ĝi sonas pli altkvalite ol tiuj.

Forestas nun la siblado sonbenda, kaj ĝenerale pli bone aŭdeblas la riĉa voĉo baritona kaj la subtila sonoreco de la maŝinaro muzika: sinteziloj, tamburiloj k.s. Solotronik — unusola membro kaj komponisto de la grupo — neniel celas imiti “normalajn” instrumentojn: sintezilo sonas sintezile.

Li evidente daŭre plilertigas pri elektromuzika muziko kaj impresas pli plaĉe, pli profesie ol antaŭe: eble li simple aĉetis novan sintezilaron pli altkvalitan; eble li pli bone konatiĝis kun la muzoj; eble la

poezio elektita pli profunde inspiris lin. La tekstoj venas de la poemaro *Ibere libere* kaj montras la talentojn de ĉiuj kunpoetoj (Neves, Camacho, L. Dek, Fernández).

Jen bonega kombinaĵo de post-modernaj poem(er)oj foje absurdaj kaj de futureca muzikstilo. Tiuj kiuj ŝatas tradician muzikon evitu tiun ĉi. Tiuj kiuj ŝatas aŭdace freŝajn kulturaĵojn tuj mendu ĝin. Eble temas pri komenco de nova tradicio: skolo de Esperanta tekno-muziko.


Miko Sloper · Usono

Helpilo sub-stratosfera

Hejma vortaro. Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto. Red. Jouko Lindstedt. Rotterdam: UEA, 1999. 62p. 21cm. € 7,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Jen vortaro kun ĉ. 500 kapvortoj, la plimulto ne radikoj sed kunmetaĵoj, respondantaj al nocioj bezonataj en la hejma uzo de Esperanto. La difinoj ne pretendas registri ĉiujn signifojn de la kapvortoj, nur tiujn kiujn oni trovis praktike necesaj. Tiu “oni” estas la anoj de la komputil-reta diskutejo *denask-l* kaj kunlaborantoj de la pli-ol-300-membra Rondo Familia de UEA. La kompilado daŭris dekon da jaroj; bone ke ĝi ricevis palpeblan formon, eĉ se ĝi estas verko en konstruo. Antaŭparole avertis la redaktinto ke oni rigardu la verkon kiel helpilon, ne normon. Tamen, ĝi impulsu la kompilantojn de PIV kaj de aliaj normigaj vortaroj inkluzivi pli da nocioj el la moderna kaj ĉiutaga vivo kaj forfaligi arkaikajn fakajn vortojn aŭ almenaŭ noti ilin tiaj. Komputilo ebligas tian pli flekseblan kaj dinamikan evoluon.

Bonvenaj aldone al la difino de la kapvortoj estas iliaj ekvivalentoj en 13



vari-familiaj lingvoj: tio donas fascinan enrigardon kiel tiuj lingvoj traktis siatempe novajn nociojn, kaj elstarigas ke ne sole Esperanto staras antaŭ terminologiaj dilemoj. Ekzemple, la kapvorto *dramserio* (pli bone “televida serio”) estas redonita japanne per hibrido (*renzoku dorama*); la fran-

ca pruntedonas *feuilleton* kaj al la nederlanda (paralele al *televisieserie*) kaj al la franc-kanada (paralele al *télérroman*); la rusa depruntas *serial*, la finna havas du variantojn, unu pruntan kaj unu propran: *televisiosarja*, *sarjaohjelma*. Pri termina koncizeco, ni konstatas ke ofte la Esperanta solvo pintas, kun la angla kaj sveda.

Ne aperas klarigoj de mallongigoj (kiel “v.m.f.o.”) uzitaj en la nacilingvaj tradukoj. Ofte demandasindoj indikas bezonon de plia konsultigo. Unu recenzanto plendis ke la francaj tradukoj havas tro fortan kanadan emfazon. Aperas vortoj (ekz. *avelo*, *dormoĉarmbro*, *ŝminki*) adekvate difinitaj en ekzistantaj vortaroj; la sola aldono de HV estas la nacilingvaj ekvivalentoj aŭ pli da citoj de parencaj vortoj.

Salutinde havi almenaŭ embriajn helpilojn ne nur por tiuj kiuj volas stratosfere apliki la lingvon al siaj specialaj fakoj, sed ankaŭ al tiuj volantaj ĝin praktike apliki en siaj vivo kaj familio.

Kiom potenca ilo iĝus tiaj hejmaj kaj fakaj vortaroj — kaj por kontentigi niajn proprajn internajn bezonojn kaj por dismontri la lingvon matura kaj utila — se ili haveblas komputile, kun hipertekstaj saltoj al sinonimoj, kategorio-grupigoj, kuntekstaj uzoj kaj ekvivalentoj en aliaj lingvoj!

Stefan MacGill · Hungario

Ankoraŭ ekzistas kosmopolitoj

Manekenoj kaj ni. 1996. 27p. 23cm. € 2,70. **Hermetikaj pumpiloj** (*por mediprotektado*). 1999. 32p. 23cm. € 3,60. **Anarkia konstruo.** 1997. 35p. 23cm. € 1,50. **Familia lingvo: Esperanto.** *Kajeroj por multlingveco* 3. 1996. 19p. 22cm. € 1,80. Triona rabato ekde tri ekz. **Ikaro ne sonĝis.** *Kial aviadiloj flugas.* 1999. 27p. 23cm. € 3,60. **Virusoj.** *Kvar teatraĵetoj.* 1999. 64p. 21cm. € 3,90. Ĉiuj: verkitaj kaj eldonitaj de Gilbert R. Ledon [Campos do Jordão, Brazilo].

Ses libretoj kuŝas sur mia skribotablo, la plej maldika 19-paĝa, la plej dika 64. Kvankam ili temas pri plej diversaj aferoj, ili kune redonas bildon de sia aŭtoro kvazaŭ puzleroj. Ĉar dise tra la paĝoj atenta leganto povas rekonstrui nekutiman biografion de Gilbert R. Ledon, esperantisto.

Krom la plej dika, ĉiuj libretoj apartenas al la serio *Teknikaj kajeroj*. En sia manskribo, komputildefo, Ledon klarigas dorskovrile: de 100 jaroj la e-istoj verkas poezion, romanojn kaj epopeojn, sed ne uzas sian lingvon en la ĉiutaga vivo, scienco kaj tekniko. La kajeroj celas helpi korekti tiun

ĉi gravan mankon. La unua temas pri manekenoj, ĉar dum parto de sia vivo Ledon estris manekenfabrikon. La dua priskribas hermetikajn pumpilojn por mediprotektado, ĉar ankaŭ tiujn li konstruis, ĝis la produktadon haltigis nevenkebla konkurenco de plurnaciaj entreprenoj. En la tria, Ledon priskribas siajn politikan kaj ekonomikan kredojn. La kvara enhavas prilingvajn konsiderojn de la aŭtoro kaj skizas la metodon per kiu li edukis siajn gefilojn parolante al ili E-on. La kvina, ĝis nun lasta, kajero naskiĝis de la hobia pasio de Ledon flugi, ĉu per glisilo ĉu per malgrandaj aviadiloj.

La sesa libreto, eksterseria, enhavas kvar teatraĵetojn verkitajn en la 50-aj jaroj: temas pri tekstoj kiujn oni malfacile imagus sur scenejo pro ilia tro skema kaj proksimuma prezento de soci-politikaj vidpunktoj.

Tamen, ankaŭ la denuncio de virusoj kiuj hantas nian socion kaj malhelpas ĝian homkonformecon, t. e. pasioj kiel ĵaluzo kaj monavido, aŭ konformismoj kiel naciismo, bigota religio kaj burokrateco, kune kun la teknikaĵoj priskribitaj en la aliaj verketoj, kontribuas al la portreto de koninda homo kun propraj fortaj sentoj, pensoj kaj scioj. Lingve ne tro poluritajn, ĉi tiujn ses libretojn mi konsideras kvazaŭ ateston pri la pluekzisto de hodiaŭ forte minacata kultura malplimulto: tiu de la kosmopolitoj, kiuj ankoraŭ aŭdacas pensi pri unuigita homaro parolanta unu lingvon, kiuj ne hontas aŭ timas agnoski la konstantan plibonigon de la homaj vivkondiĉoj danke al tekniko. Mi gardas la esperon ke la verda movado, sobriĝinte de sia lastatempa “etnisma” ebrieco, baldaŭ revenos al la ideoj kaj sintenoj kiuj estis ĝia fekunda bedo.

Giulio Cappa · Italio

Vekilo pri ĉies socio

La familio (1933). Bakin (1904). El la ĉina trad. Wei Yida. Poluris Li Shijun. Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 1999. 572p. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Ilus. Yu Shouwan. € 24,00.

Malantaŭ fermitaj pordoj de la hejmoj okazas la plej grandaj tragedioj. Tiu universala vero aplikeblas ankaŭ al Ĉinio, kie oni ankoraŭ komence de la jarcento kripligis la piedojn de knabinoj kaj la mensojn de knaboj kaj knabinoj. Nuntempe oni ne plu kripligas la piedojn, sed pri la mensoj mi ne tre certas. Kaj pri tio ne nur rilate al Ĉinio.

La fama verkisto kaj esperantisto Bakin kaptas en sia furora verko *La familio* rilatojn, emociojn, tradiciojn, fortojn kaj feblojn de homoj loĝantaj sub unu tegmento. La tradicia vivmaniero kun ĉiaj superstiĉoj, transmonda revado kaj reguloj konfrontiĝas kun la realeco en formo de milito kaj ribelo de la juna generacio. Ĝi rifuzas la tradician vivstilon, sed ne povas komplete liberiĝi enmense. Tiel, la bataloj okazas ne nur surstrate, sed ankaŭ en la kapoj de la ĉefroluloj.



La familio estas forta libro. Ĝi ne nur donas kolorplenan, realisman fonon al kompreno pri la ĉina socio hieraŭ kaj hodiaŭ, sed ankaŭ profunde kaj universale rakontas pri komplikaj homaj rilatoj. Rilatoj kiuj povus esti multe pli simplaj, se la homoj kiuj ilin vivas estus liberaj de premo fare de la socio kaj de la familia cerbolavado.

La familio metas multon ĉi-rilate en perspektivon. Ne nur mi rekonis kaj povis identigi la historian fonon de propraj spertoj en Ĉinio, kiuj siatempe aspektis konfuze por mi, kreskinta en alispeca socio. Sed la sociaj tradicioj kaj "moroj" tiom klarvide priskribitaj de Bakin plu vivas hodiaŭ, kaj ne nur en Ĉinio. Ili vivas eĉ en la "liberigitaj" socioj en la okcidenta mondo, sub iom aliaj formoj. *La familio* tiel funkcias ne nur kiel vekilo pri la ĉina socio, sed ankaŭ tre forte pri la propra. Per la bonega traduko de WEI Yida, lerte polurita de Laŭlum, ekzistas nun la eblo konatiĝi kun tiu ĉi mejloŝtona verko en la ĉina literaturo kaj faligi iom da skvamoj de la okuloj. Mi varme rekomendas.

Sabira Ståhlberg · Bulgario

RECENZO AL RECENZO

Evidente, oni jam povas diri ke la poemaro *Moskvaro* estas rimarkita en la mondo. En malpli ol jaro aperis recenzoj en *Literatura Foiro*, *La Gazeto*, kaj nun – en *Esperanto* (nov. '99, p. 198). Tamen vere strange aspektas tiu lasta, de Ionel Oneț, kaj ne eblas ne repliki al ĝi...

Jes, la preskvalito de *Moskvaro* ne estas lukso. Ĉu iu provis eldoni libron per nur 40 dolaroj kaj sia entuziasmo? Ni faris. Ĉiu aŭtoro investis iom da propra mono (tuj post la terura financa krizego en la lando!), enkomputiligis siajn verkojn mem aŭ helpe de amikoj; de

mateno ĝis vespero la 6-an de novembro 1998 ni trio (mi, N. Gudskov kaj lia amikoneesperantisto) laboris en mini-presejo – kaj jen la rezulto! Vere bedaŭrindas nur ke ne ĉiu aŭtoro egale atente zorgis pri sia parto – tial en la postparolo svarmas preseraroj. Ni ne havis pentriston kaj la kovrilpaĝan bildon simple kopiis de centrubla monbileto. Rusianoj ĉiam inventemas pro malriĉo kaj ne perdas optimismon...

Tamen, bedaŭrinde, s-ro Oneț, obsedata de sia kontraŭtotalisma vervo, ŝajne nenion komprenis en la enhavo de la libro. Ni rigardu la paĝojn indikitajn de li:

P. 40. La poemo rakontas pri piankoncerto de talentaj infanoj. Jes, la nuna tempo komplikas, sed *l' infanoj arte instigas / al vivem' kaj al bono vokas* – do la humoro de la aŭtorino estas optimisma.

P. 41. Temas pri avangarda pentraĵo en arta ekspozicio, kies artan valoron malfacilas taksi. Neniu vorto pri "nova sociordo".

P. 58. Post la citita linio "*La tempo estas nun severa*" tuj sekvas: *sed ĝi fariĝos nepre – bela*.

P. 10, 11. La poemoj estas intime lirikaj, denove neniel tuŝantaj la socion, kaj – plej amuze – verkitaj en 1989, kiam neniu suspektis pri estontaj ŝanĝoj. En ĉiu lando homoj havas ĉiutagajn zorgojn kaj deprimiĝas pro malfeliĉa amo. Eĉ se hodiaŭ vi havas feliĉon – ĉu longe tio daŭros? *Futur' neklaras kaj Raŭka improvizo la San de marto 1994* (p. 23), estas verkitaj por transdoni tian

necertecon – speciale kun "r" en ĉiu vorto. Certe Dadaev, multe pli juna ol mi, "himnas al libero" – ne havante seriozajn zorgojn, li povas ankoraŭ revii.

P. 47. Temas pri persona malfeliĉo de homo, subite perdinta sanon – ne ĉiuj en tia stato scipovas kondukti digne, sed tiun kiu scipovas, sanaj homoj povas envidii...

Plej ridindas la esprimo "novaj rusianoj", kiun s-ro Oneț uzis tute ne sciante ĝian sencon. Ŝajne en preskaŭ ĉiu lando oni simile nomas novriĉulojn – kun abundego da mono kaj neniom da kulturo. Ĉu ilin povas regi malespero? Mi ne scias, tiaspecaj personoj mankas inter miaj amikoj...

Do, por la recenzinto la batalemo ŝirmis ĉion, kaj li perdis la kapablon rimarki belecon kaj amon. Ni kompatu lin.

Valentin Melnikov,
kunaŭtoro de Moskvaro



Kun viaj kontribuajoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Koran dankon!

Laste aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Being colloquial in Esperanto. A reference guide. David K. Jordan (1942). El Cerrito: ELNA, 1999 (2-a eld.). 232p. ISBN 0 939785 04 8. 22cm. Bind. Kromkovrilo. Anglalingva. Referenca gramatiko por progresintoj, kun multaj ekzemploj kaj 93-paĝa listo de falsaj amikoj kaj aliaj malfacilaj vortoj. € 16,80.

Domo de la popolo, La (1927). Louis Guilloux (1899-1980). Antaŭparolo de Albert Camus. El la franca trad. Traduk-grupo de Esperanto-Bretagne. Rennes: E-Bretagne, 1999. 124p. ISBN 2 9514747 0 9. 21cm. Aŭtobiografia fiekca romano de bretonia aŭtoro: ŝuisto klopodas starigi socialistan sektion en sia urbo. € 11,70.

Jarkolekto Esperanto 1999. 224p. 27cm. Bind. 11 numeroj. € 23,15. Triona rabato ekde tri ekz.

Korea antologio de noveloj. Kompilis CHO Sung Ho, KIM Uson. El la korea trad. Verda E. Kim, KIM Uson, BAK Giŭan k.a. Seulo: Korea E-Asocio, 1999. 339p. ISBN 89 87281 02 7. 22cm. Kolekto de 25 tradukitaj kaj unu originala noveloj (1922-78). € 21,60.

Kvar noveloj (1907-13). Valerij Brjusov (1873-1924). El la rusa trad. Grigori Arosiev, Aleksander Korĵenkov kaj Ilija Novikova. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999. 24p. 20cm. Historioj kun svaga limo inter la reala kaj fantazia mondoj. € 2,10.

Kvarteto Esperanto. El la slovaka trad. Eduard V. Tvaroŝek. Trenčín: la aŭtoroj, 1999. 115p. ISBN 80 85876 29 9. 27cm. Fajne bind. Dulingva: Esp-slovaka. Kun fotoj. Luksa albumo kun teksto kaj muziknotoj de 40 kantoj slovakaj kaj 20 aliaj el la repertuaro de la kvarteto; anekdotoj el ĝia historio. (Vidu jan., p. 5.) € 15,00.

Laboro de Universala Esperanto-Asocio por pli paca mondo, La. Ulrich Lins (1943). Rotterdam: UEA, 2000. 12p. 21cm. Esperanto-Dokumentoj 36E. € 2,15. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Liberpoeto, La (1938). Dan Tirinaro (Ĝong Sasop, 1910-44). Seulo: Korea E-Asocio, 1999. 203p. ISBN 89 87281 01 9. 22cm. Ilus. Kun fotoj. Reeldono de originala poemaro apenaŭ konata sed koninda, la unua kiun verkis koreo. € 10,80.

Mia fenestro alĉiela. Elektitaj poemoj (1989-99). László Ötvös (1930). El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: E-Societo, 2000. 53p. 21cm. Cento da poemoj de pastoro-poeto. € 3,90.

Political aspects of language rights. Is there a remedy to the "glottophagy" of English? Andrea Chiti-Batelli. Roma: la aŭtoro, 2000. 20p. 24cm. Anglalingva. Varianto de la eseo *Por politiko de Esperanto* (UEA, 1997). € 3,00.

Poltergejt' ne kulpas. B[oris] A. Zozulja (1941). Rostov-Don: Verda Kukolo, 1999. 52p. 21cm. Natursciencaj klarigoj de strangaj fenomenoj. € 3,30.

Pradinis Esperanto kalbos kursas. Elementa Esperanto-kurso en 34 lecionoj. Metodika paroliga materialo. Telesforas Lukoševičius. Panevėžys [Esperanto-klubo Revo], 1999. 87p. ISBN 9986 496 05 5. 30cm. Por litovlingvanoj. € 13,50.

Protestantaj magnolioj. Elektitaj poemoj. Sándor Beke (1961). El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: E-Societo, 1999. 72p. ISBN 963 03 8833 2. 21cm. 39 verkoj de transilvania poeto. € 3,00.

Sur altaro de Sundio. Napisten oltárán. Éva D. Kovács. El la hungara trad. Tibor Papp. Budapest: Pŭski, 1999. 87p. ISBN 963 9188 62 X. 20cm. Dulingva: E-hungara. Poeta sonĝo baze de prahungara legendo pri la originoj. € 4,80.

Zamenhof today. Can his idea of a universal lingua franca be revived and brought up to date? Andrea Chiti-Batelli. Antaŭparoloj de Renato Corsetti kaj Umberto Broccatelli. Milano: Federazione E-ista Italiana, 2000. 45p. 21cm. Anglalingva. Provo aktualigi la homaranismon sur lingvoproblema kampo. € 3,00.


KD-ROMOJ

Super-markto. Videokurso. St. Brieuc: Esperanto-Bretagne, 1999. 25 min. Formato MPEG. Bildoj kun superskribo en E-o. Por PC kaj Makintoŝo. Scenoj uzantaj vortojn de la ĉiutaga vivo. € 9,00.

Telegramo. Videokurso. 45 min. Aliaj indikoj kiel ĉe *Super-markto*. € 9,00.

VIDBENDO

Super-markto + Telegramo. St. Brieuc: Esperanto-Bretagne, 1999. 70 min. Super-skribita en E-o. Pedagogia video-materialo. Scenoj kun ĉiutaga vort-uzo. € 18,00.



Koreio atutas beletre ĉi-monate.

Notoj pri la plej granda kuraĝulo. Legendoj pri Hajduko Veljko kaj pri lia naskiĝvilaĝo Lenovac. Sergije Kalčić. El la serba trad. la aŭtoro kaj Jadranka Mirić. Zaječar: Muzeo "Hajduk-Veljko", 1999. 55p. 20cm. Dek legendoj pri popola heroo de ĉ. 1800. € 1,80.

Pasporta Servo. La listo de gastigantoj de TEJO, 2000. Rotterdam: TEJO, 2000. 187p. ISBN 83 900118 3 2. 15cm. Kun 1075 adresoj en 76 landoj. Mapoj. Vidu p. 56. € 10,90. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Plena poemaro. Stanislav Schulhof (1864-1919). Editoris Herbert Mayer. Vieno: Internacia E-Muzeo, 1999. 31p. 21cm. Originalaĵoj kaj tradukoj. Kun fragmentoj de epopeo el la postlasaĵo. € 3,00.

Politica d' insegnamento delle lingue nella Comunità Europea, La. Stato attuale e prospettive future. Andrea Chiti-Batelli. Roma: Armando, 1988. 215p. 24cm. Italilingva. "La politiko pri lingvo-instruado en la Eŭropa Komunumo. Nuna [t.e. antaŭ 12 jaroj] stato kaj perspektivoj". € 12,00.

Kaj plue...



FINNLANDO: Fabela konkurso

En Finnlando, tutmondan Esperantlingvan fabelkonkurson por infanoj proklamas Instituto Päätaalo (edukcentro por verkistoj) kaj la Vilaĝasocio de Metsäskylä. Povas konkursi ĉiu infano sciopovanta aŭ nur lernanta E-on, en tri kategorioj (sub 9 jaroj, 9-10 kaj 11-12 jaroj), sendante ĝis la 30-a de jun. mem-verkitan fabelon kiel ajn mallongan, sed ne pli longan ol 3 tajpitajn paĝojn, al Instituto Päätaalo, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando (✉instituutti@taivalkoski.fi, <http://www.taivalkoski.fi/paataalo-instituutti>). Skribu sur la koverto: "Fabelkonkurso". Pli da informoj: Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando; ✉aini.vaaranieni@pp.inet.fi.

HISPANIO: Kulture kaj klerige

La 7-a Internacia E-Semajno (2-9 okt., Cambrils, Tarragona, Katalunio), kun 72 partoprenantoj, havis tre riĉan klerigan progra-



RUSLANDO: Ĉe ĉuvaŝoj, pri ĉeĉenoj

"Socia nenecese de E-o kaj ĝia tamena bezonateco" kaj "E-sektismo kaj E-movado" titoliĝis la diskut-lanĉaj prelegoj de Nikolao Gudskov resp. Andreo Ananjin en komuna kongreso (3-6 feb., Ĉeboksari, Ĉuvaŝa Resp.) de Rusia E-ista Unio (REU),



Knabo kun ĉeĉena flago en Groznj (1997)

E-Junularo en Rusio (SEJM) kaj Junulara E-Asocio de Ĉuvaŝa Resp. Registriĝis 51 delegitoj el 12 urboj. En la konferenco de REU, la 18 delegitoj taksis la agadon de la estraro nekontentiga kaj elektis estraron novan, kun prezidanto Andreo Ananjin. SEJM ŝanĝis sian nomon al REJM (Rusia E-ista Junulara Movado), ĉar ĝia historia siglo SEJM de longe ne respondis al la efektiva nomo. Unuanime akceptita kongresa rezolucio atentigas E-redaktorojn pri la oficiala nomo de ĉi tiaj aranĝoj: "Rusia Esperantista Kongreso". Alia rezolucio, pri la milito en Ĉeĉenio, ne estis akceptita, nur subskribita de 20 individuoj: "La sekvaj partoprenintoj (...), konstatante mortigon de pluraj miloj da homoj en Ĉeĉenio, opiniante neebla solvado de politikaj problemoj per forto de armiloj, malgraŭ pravigo per ajnaj noblaj kialoj, firme kontraŭas daŭrigon de milito en Ĉeĉenio, elpaŝas por urĝa komenco de senperforta, paca solvo de politikaj problemoj en Ĉeĉenio." (N. Gudskov)



76-LANDE: Pli ol mil gastigantoj

Jus aperis la ĉi-jara broŝuro de Pasporta Servo, la plej fama servo de TEJO (vidu ankaŭ p. 55). 1075 adresoj de gastigantoj en 76 landoj signifas 14%-an kreskon en unu jaro, super la "magian milon". Plej multaj (91) gastigas en Rusio, dum la reto plej densas en Francio (61). En la poŝlibro troviĝas, krom la adresoj kaj utilaj mapoj, i.a. uz-reguloj kaj konsiloj, kaj fragmentoj el vojaĝrakonto de usona uzintino de PS, Amanda Higley.

PS-membro (t.e. posedanto de la adresaro) rajtas laŭ interkonsento senpage tranokti ĉe gastigantoj. Ĉi tiuj ricevas PS senkoste. Administras la liston Derk Ederveen (Westenburgstraat 15, 2275 XR Voorburg, Nederlando; ✉pasporta.servo@esperanto.nu, <http://home.wxw.nl/~lide/paspserv.htm>).

→ mon: i.a. prelegis Juan Antonio Cabezas ("George Orwell kaj nia mondo") kaj Jesuo de las Heras (pri la gitaristo Francisco Tárrega Eixea, 1852-1909); prelego de Jean Amouroux pri Paul Berthelot (1881-1910), fondinto de nia revuo, estis laŭtlegita; Giordano Moya pensigis pri "Socia evoluo" kaj Antonio Marco Botella pri "Eŭropo, la naciismo kaj la multlingvismo". (KAE-Informilo)

ISLANDO: Zamenhof unuafoje

En la rimarkinda jartriona revuo *La Tradukisto* (n-ro 33) la Zamenhofa artikolo "Ĉu ni progresas?" (1892) aperis island-lingve. Laŭ la islandiginto Hilmar Bragason temas pri unuafoja "traduko el verkaro de L. L. Zamenhof".





HAHLBOHM 90-jara

Unu el la plej maljunaj e-istoj de Berlino, Rudolf Hahlbohm, 90-jariĝis la 2-an de jan. Konanto de E-o ekde la 20-aj jaroj, teatrosciencisto gvidinta pupateatron en Orienta Berlino, pentristo, Hahlbohm jam antaŭ 1965 forte agadis por la repermiso kaj reaktivo de la E-movado en Berlino. En 1965 li kunfondis "Centran

Laborrondon de E-Amikoj en Germana Kulturligo", ĉiam estis ties prezidiano kaj ĝin prezidis de 1977 ĝis 1981. Ni deziras multajn jarojn kaj sanon! (*Berlina Informilo*)

MUCHAHARY: Agnosko

Jebra Muchahary, barata parto-prenanto de la projekto Indiĝenaj Dialogoj (vidu dec. '99, p. 206) estis unu el la nur du sia-regionaj ricevantoj de "Premio por la plej laŭdindaj civitanoj el Barato", agnoske al lia lernejo Saint John Mission.

PETTYN: Pensiito plu aĝetos

La 29-a de feb. estis la lasta labor-

tago de Andrzej Petryn (61-jara) en la E-Redakcio de Pola Radio, kie li pasigis pli ol 40 jarojn de post ekdeĵoro la 6-an de apr. 1959. "Nun estas tempo pensi-


uliĝi, sed tamen mi plue kunlaboros en iom limigita grado" — li anoncis. La nova gvidanto de la E-Redakcio estas lia koleginino Barbara Pietrzak.



LUIN: Unu el 50 nepraj

La sveda revuo *CAP&Design*, pri grafika dezajno, artikolas pri la 50 plej bonaj Interretaj lokoj por dezajnistoj. Unu el la 50 retejoj "nepraj", kiel la revuo

nomas ilin, utiligas E-on: Omnibus typografi (<http://www.omnibus.se>) prezentas la tiparojn de Franko Luin (58-jara), konata sveda esperantisto. (Irja Kaponen, NUN)



JUGOSLAVIO: Milita uzo

En *Svet kompjutera* (n-ro 7/99), la plej populara serblingva revuo pri komputado, servil-estiro el la urbo Niš (<http://target.cent.co.yu>) menciis Esperanton inter

la lingvoj uzitaj por Interreta informado eksterlanden dum la pasintjara milito. (Z. Ĉirić)

KROATIO: Familece

Kroata televido montris en februaro filmon pri Esperanto kiel hejma lingvo de la Zagreba familio Jagnjić-Tišljar. La 23-an de jan. Spomenka Štimec gastis en la elsendo "Familia tagmanĝo" por rakonti pri siaj Esperantaj spertoj en Japanio. (S. Štimec)

ITALIO: Intensigaj komisionoj

Itala Esperanto-Federacio starigis serion da komisionoj por intensigi sian aktivadon en diversaj kampoj. Jam ekfunkciis la komisionoj pri informado (estras Fabrizio Pagliaroli, pagliaroli@speednet.it), pri instruado (Laura Brazzabeni, lbrazza@libero.it), pri renkontiĝoj (Edvige Tantin Ackermann, nored@iol.it), pri kontaktoj kun membroj de Eŭropa Parlamento (Umberto Broccatelli, u.broccatelli@tiscalinet.it), pri serĉado de financaj subtenoj (Giorgio Pagano, g.pagano@archiworld.it) kaj pri rilatoj kun UEA (Renato Corsetti, corsetti@itelcad.it). (*TEA-Bulteno*)

JORDANIO: Reĝa estingo

La reĝo de Jordanio, Abdullah la 2-a, mallonge rolis kiel fajrobrigadestro la 10-an de februaro. Rimarkinte ekeston de incendio dum helikoptera flugo, li surteriĝis kaj restis sur-



Abdullah la 2-a

loke ĝis kompleta estingo de la fajro. Temis pri stokejo de dekoraĵoj por la Reĝa Centro pri Kulturo, la stablo kiu donos lokon al la seminario "Esperanto en la arabaj landoj" (vidu feb., p. 26). (*Al-Dustour*)

SLOVAKIO: Pri E-kolekto

TV-stacio en la ĉefurbo Bratislavo elsendis la 28-an de okt. 10-minutan intervjuon kun Ernesto Geleta, dumviva membro de UEA, pri E-o kaj pri lia 2300-era E-kolekto. (*Esperantisto Slovaka*)

Surportu Esperanton

"(...) aŭdiĝas konstante la sama frazo: 'Aĥ! Ĉu Esperanto ankoraŭ ekzistas?' Jen kio pruvas, ke la homoj malofte aŭdas ion pri Esperanto, dum ni, esperantistoj, havas la impreson, ke oni parolas pli kaj pli pri ĝi ĉe la radio, ĉe la televido kaj en la gazetaro, sed tio restas impresado, pro tio ke la dissenditaj mesaĝoj estas tre efemeraj kaj ne alproĉas la atenton... necesas alstrebi permanentecon... La suresto de la vorto 'ESPERANTO' sur objekto ĉiutaga kiel gantoj obeas tiun postulon" —



emfazas la gravecon de reklamportiloj François-Xavier Gilbert en *La Domo*, organo de Tutmonda Asocio de Konstruistaj Entreprenistoj, kiu jam de jaroj aplikas tian politikon de paŝoj tre konkretaj, kaj komercaj, por reklami nian lingvon.

Milionoj da ekzempleroj

Yomiuri Shinbun estas la plej granda ĵurnalo en Japanio kun eldonkvanto de 10,5 milionoj. *USA Today* estas la pli granda el la du tutlandaj ĵurnaloj de Usono, vendanta 2 500 000 ekzemplerojn. En januaro ili ambaŭ informis milionojn da legantoj pri E-o:

La plejparte favora artikolo "Religia kredo je Esperanto" aperis en la sekcio "Life" de *USA Today* la 27-an de jan. kaj estas trovebla per "Search" ĉe <http://usatoday.elibrary.com/>.

En *Yomiuri Shinbun* la 29-an de jan. aperis artikolo pri lingvaj problemoj de japanoj kaj Esperanto kiel taŭga solvo, de Miyosi Etsuo, prezidanto de la ganto-fabrika kompanio Swany, mecenato de UEA.



ĈU VI JAM REKOTIZIS POR 2000?

SE NE, TIU ĈI ESTAS LA LASTA NUMERO DE NIA REVUO KIUN VI ANKORAŬ RICEVAS!



ETNISMO: Kondamno al ETA

Post la mortigo de la politikisto Fernando Buesa la 23-an de feb., la prezidanto de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, Daniele Vitali, sendis proteston al Herri Batasuna, la eŭska partio konsiderata kiel "politika brako" de la terorisma organizo ETA. IKEL pli frue esprimis sian kondamnon de ajna terorismo en "Deklaracio por Etnista Humanismo" (vidu feb. '99, p. 37).

KOMUNISMO: Kontaktoj kubaj


51 gastoj el 8 landoj ĉestis la 12-an Konferencon de Internacia Komunista E-ista Kolektivo (27-30 dec., Havano, Kubo). La konferenco decidis aliĝi al Manifesto 2000 (vidu almetaĵon de ĉi tiu revuo — Red.), kondamnis la blokadon de Usono al Kubo, rezolucis pri "la rabado de infano Elián González, fare de la Miamia mafio" kaj sendis leteron al Bill Clinton "pri tiu atenco al la Deklaracio pri Infanaj Rajtoj". Elektiĝis nova IKEK-estraro, kiun

prezidas Faustino Castaño Vallina (Hispanio). Okazis renkontiĝo kun membroj de la Centra Komitato de la frat-partio en Kubo kaj vizito al UNIAC, organizo ariganta la asociojn de "Amikeco kun Kubo" tra la mondo. La 4-an de jan. *Granma*, la ĉefa kuba gazeto, menciis la konferencon kaj ĝian rezolucion pri Elián. (V. Charlot, Ret-Info)

MUZIKO: Jubilea kanto

La n-ro 2-3/1999 de la nova revuo *AmUzE* (vidu okt. '99, p. 177) publikigas intervjuon kun la 22-jara bulgara muzikisto Laĉezar Krastev, kiu en la Berlina UK gvidis la Internacian E-Ĥoron

Sur la kantoj de la Internacia E-Ĥoro
Tra la mondo sonas kant'.
Transflugas ĝi de land' al land'.
Transflu Trans lin



anstataŭ la malsana Dimitar Terziev. Krastev nun preparas kun Terziev specialan programon por la Tel-Aviva UK, kie la 20-jara ĥoro jubileos. Li ankaŭ komponis jubilean kanton (notoj en *AmUzE*) kaj alvokas verkemulojn krei tekston por ĝi. (Vidu ĉe http://members.xoom.com/interpres_bg/a9902-k3.html)



Bonvenon al la Esperanto-trinkejo en Kievo!

ZEO-j: Pli kaj pli bongustas Esperanto

La nomo "Esperanto", en la kulinara kampo, ŝajne fariĝas okaza sinonimo por "internaci-stila kuirarto". Tiun impreson konfirmas la pasintjara malfermo de restoracio Esperanto en Novjorko, ĉe Avenuo C kaj 9. Strato. (*Novjorka Prismo*)

En Veisiejai (Litovio), kie dum la 34-aj Baltaj E-Tagoj estis inaŭgurita monumento al Zamenhof, vivinta tie en 1885 (vidu sep. '98, p. 163), nun funkcias ankaŭ kafejo Esperanto, kaj kelkaj ŝildoj en la urbo montras la direkton al ĝi. (*Litova Stelo*)

En Shenyang (ĉefurbo de la ĉina provinco Liaoning), loka e-isto Li Liang kaj Robin McFarland el Usono prezentis proponan leteron al la urbestro por nomi estontan straton "Zamenhof". McFarland laboras en Shenyang ekde oktobro kiel instruisto de la angla. (Li L.)

En la ĉefurbo de Ukrainio, la kafejo Esperanto-Bar 96, kun E-lingva menuo (str. Solomenskaja 1, Kievo), iĝis la tria Zamenhof/Esperanto-Objekto en la lando. (La antaŭaj estas la fama Zamenhof-busto de N. Blaĵkov en korto de Odeso kaj la skvaro Esperanto en la urbeto Rava-Russkaja ĉe la landlimo kun Pollando.) (M. Linekij)

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Britio: M. F. Cayley. Francio: Bruno Robineau, Lucie Mazurkiewicz, Viktoro Simonnet.

PATRONOJ DE TEJO 2000

Belgio: José A. Pinto de Sousa; Stella De Weerd. Britio: Martyn Hugh McClelland; Neil MacKilligin. Finnlando: Anna Ritamäki. Nederlando: Danny ten Haaf; Saskia J. A. Idzerda.

SOCIETO ZAMENHOF 2000

Belgio: José A. Pinto de Sousa; Stella De Weerd. Finnlando: Irmeli Tanskanen. Germanio: Albrecht Kronenberger. Hispanio: Josep Franquesa Solé. Nederlando: Anneke Schouten-Buys; Danny ten Haaf; W. C. Keizer. Portugalio: João Alberto Frazão de Faria. Svedio: Sten Axel Broman; Malte Gahlén.

DONACIOJ 2000 (EUR)

ĝis la 31-a de januaro

Fondaĵo Afriko: Belgio: J. A. Pinto de Sousa 72,27. Nederlando: C. Bossong-Singer 7,41. Nov-Zelando: T. Jansen 10,15. Sumo ĉi-jara: 89,83.

Fondaĵo Azio: Japanio: Oomoto E-Hukyukai 94,61; H. Abe 37,84; M. Hirotaka 18,92; T. Huzisima 18,92; Y. Kuroyanagi 18,71; S. Matsumoto 18,92; M. Nakatu 37,42; Y. Oosaki 18,71; Y. Ootuka 18,92; Y. Sawaya 18,92; T. Taniguti 18,92; K. Ueno 18,92. Sumo ĉi-jara: 339,73.

Fondaĵo Kanuto: Francio: J. P. Angevin 20,58; M. Basso 28,05; J. Croze 30,49; F. Dhersignerie 30,48; J. Ducrocq 152,45; O. Masseron 74,70. Luksemburgio: B. Moon 100,00. Nederlando: C. Duivenvoorden-Kors 24,05; R. Vetter 42,76. Nov-Zelando: D. Dewar 25,38. Svislando: L. Otelli 13,67. Sumo ĉi-jara: 542,61.

Konto Espero: Francio: A. Tailpied 15,24. Hispanio: M. R. Uruña de Hernández 35,00. Japanio: T. Tadaisi 30,87. Sumo ĉi-jara: 81,11.

Junulara Fondaĵo: Francio: M. Feneyrol 1524,49. Sumo ĉi-jara: 1524,49.

Oficeja Ilaro: Anonime 1134,45. Nederlando: N. Rašić 11,34. Sumo ĉi-jara: 1145,79.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Germanio: O. Nelken 50,00; E. Schwarzer 50,00. Luksemburgio: B. Moon 100,00. Sumo ĉi-jara: 200,00.

Volontula Fondaĵo: Francio: J. P. Angevin 15,24; J. Ducrocq 76,22. Japanio: W. Schmid 10,00. Nederlando: F. J. Pieterse-Kruger 45,38; Y. Weidema 100,44. Sumo ĉi-jara: 247,28.

Ĝenerala Kaso: Danio: P. K. Poulsen 20,04. Francio: A. Tailpied 15,24. Kostariko: F. Darcia 10,00. Nederlando: Roterdama E-Societo Merkurio 226,89; L. A. Demmendaal 206,47. Svislando: D. Bühlmann 31,08; L. Dovat 12,43; E. Jayet 2,49; H. Macher 11,81; Parzival 3,11; J. Tomaszczuk 4,35. Sumo ĉi-jara: 543,91.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



Nederlandaj apero, malapero

Post 53 jaroj da regula aperado (el kiuj 27 sub redakto de Johano



Poptie), ĉesas *Fervojisto*, la jarkvarona organo de Fervojista E-ista Rondo Nederlanda. La kialo simplas: malfondiĝas FERN mem, ĉar "inter la nederlandaj fervojistoj tute ne ekzistas interesiĝo

por la internacia lingvo".

Por pli vasta publiko ekaperis *Monditaal*, jarkvarona nederlandlingva revuo de la landa asocio Esperanto Nederland "pri lingvo, lingva diskriminacio kaj la lingvoproblemo", sub redakto de J. H. Derks kaj grafika pri-zorgo de Saskia Idzerda.

Nova adreso de Heroldo

Kontribuojn oni sendu al la nova vicredaktoro Stano Marček: Zvolenská 15, SK-03601 Martin, Slovakio; ☎+421/842/422-27-88; ✉Heroldo@esperanto.sk. Administraj aferoj plu: CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

El la vivo de GDR

En la monografio *Zwischen Mosaik und Einheit, Zeitschriften in der DDR* ("Inter Mosaik kaj Einheit, periodaĵoj en GDR", red. Simone Barck k.a., Berlin: Ch. Links Verlag, 1999) Torsten Bendias

VIZITU VIAN PROPRIAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 13-an de majo 2000 (10h00 - 17h00)



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazaro de e-aĵoj

Speciala gasto:
GIAN CARLO FIGHERA



- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhanta prezentado de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondeblas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vidu en la kolofono, sub la enhavotabelo.



ANONCETOJ

ERARE ATRIBUAS AL KALOCSAY fragmenton el *Kanto de l' kantoj* (p. 6) la kompilinto de la kajereto *Erotika poezio en Esperanto*, B. Zozulja. La aŭtentan tradukon de Kalocsay enhavas la antologioj *Eterna bukedo* kaj *Tutmonda sonoro*. Ada Csiszár.

KORESPONDI DEZIRAS 25-jara fraŭlo; pluraj profesioj; serĉas amikajn kontaktojn kun ge-esperantistoj mondscale. Liaj hobiaĵoj estas lingvoj, muziko, vojaĝoj, kulturo. Adreso: Eduard Bistrov, P.K. 1963,

Krasnojarsk, RU-660025, Rusio.

LA ESTRARO DE E-ASOCIO DE BRITIO anoncas ke ĝi ne havas ligon kun nova Esperanto Party en Britio aŭ kun iu alia politika partio.

SIAN LIBERAN TEMPON volonte oferos al esperantistaj grupoj vizitantaj Kopenhagon Eugeniusz Rybarczyk, pensiulo, bona konanto de la urbo, kiu ilin gvidos senpage. Adreso: Bispeparken 29.lth, DK-2400 Kopenhago NV, Danlando.

analizas en germanlingva, sed Esperante titolita studo "El la vivo de GDR" (12p.) la historion de la orient-germana revuo *Der esperantist* (1965-90).

"Ĉu estis, ĉu ne estis"

"Fabel-komencoj": Blazio Vaha prezentas sur ses paĝoj de *Internacia Pedagogia Revuo* (1999/4), kun "tute rimeda karaktero", komenca(j)n frazo(j)n de centoj da E-lingvaj fabeloj originalaj kaj tradukaj, por "kontribui al la konsciigo de jama tradicio de

kliŝoj kaj titoloj" kaj "al la disvolviĝanta esplorado de la kulturhistorio de Esperanto".

Rusia songazeto porblindula

Ekde 1995 aperadas *Voĉo de Amikeco*, 90-minuta sonkaseta revuo jarkvarona de Rusia E-Asocio de Nevidantoj, pri E-movado en Rusio kaj eksterlande, kun kantoj, literaturaĵoj kaj sonigitaj artikoloj el E-periodaĵoj. Abonebla ĉe Vladimir Rassohin (a/j 96, RU-352900 Armavir, Ruslando; ✉bespalov@sochi.ru).

LA PLEJ KONATA LIBRO
PRI EFIKA TEMPOUZO,
NUN EN ESPERANTO!

Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado

Rotterdamo: UEA, 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj* n-ro 2. 53 p. Prezo: € 3,40. Triona rabato ekde 3 ekz.



Tomás ALBERICH I JOFRÉ (1918-1999), iama estrarano de Kataluna E-Asocio, mortis la 22-an de aprilo pasintjare en Barcelono.

Ingvar ERIKSSON (1917-1999), antaŭe delegito en Falköping (Svedio), prizorganto de loka radioprogramo pri Esperanto, forpasis fine de decembro.

Paul POISSON (1917-1999), aktivulo por la utiligo de E-o en la Freinet-instruado, forpasis novembre en Tours (Francio).

Wim QUISPÉL (1901-2000) mortis la 13-an de januaro en Roterdamo. Aktiva en la laborista E-movado, dum 20 jaroj (1972-92) li zorgis pri la presigo kaj dissendado de la SAT-revuo *Sennaciulo*. Li ankaŭ bindadis jar-kolektojn de nia revuo por UEA.



Komplezo de Sennaciulo

Thomas A. GOLDMAN (1918-2000), dumviva membro, regula ano de Societo Zamenhof, longtempa delegito en Vaŝingtono kaj fakdelegito pri ekonomiko, mortis la 7-an de jan. en Bethesda (Marilando, Usono). Ekler-ninte Esperanton kiel 14-jarulo, li poste instruis ĝin dum kvardeko da jaroj, unue al kunstudentoj ĉe Universitato Harvard. Multjara prezidanto de la Vaŝingtona klubo, li prezidis ankaŭ la usonan landan aso-



Arkivo de UEA

cion ELNA (1983-84) kaj servis aktive en la Komitato de UEA (1983-86, 1992-95).

Goldman fondis, plejparte sola verkis kaj tre kompetente redaktis la monatan *Ekonomia Bulteno pri Usono* (1980-94), kontribue al la ekonomika apliko kaj terminologia evoluo de Esperanto. Tiel li metis en praktikon sian movadan filozofion: "La venko ne estas unu grandioza evento, sed senfina sinsekvo de malgrandaj venkoj... procedo, ne okazo. Ni ne fantaziu plu pri la fina venko, sed eniru la vojon de senĉesa venkado!" "Ĉiu esperantisto estas ja 'potenciala aplikisto'." ('89 feb., p. 30; '92 jul.-aŭg., p. 128)

Jesús RAPOSO MONTERO (1918-1999), vicprezidanto de la E-grupo en Valencio (Hispanio), mortis la 16-an de decembro. Pacifisma kaj ekologia aktivulo, li presigis broŝuron kun *Tri tutmondaj proponoj* por distribuo en la Valencia UK (1993). Dank' al liaj klopodoj okazas oficialaj E-kursoj en la Universitato de Valencio, ĝis nun

kun preskaŭ 400 lernintoj.

Aderaldo ROCHA (1922-1999), dumviva membro, delegito pri lingvistiko kaj parapsikologio, konata en sia regiono pro prelegoj pri kaj kursoj de E-o, mortis la 17-an de dec. en Itabuna (Bahio, Brazilo).

Joachim SCHULZE (1939-2000) forpasis la 10-an de januaro en Lepsiko (Germanio). Ĵurnalisto kaj grafikisto, li estis dum pli ol jardeko aktiva membro de la Centra Estraro de GDREA kaj de la organizaĵo en Lepsiko, kie li kunorganizis multajn el la famigintaj Internaciaj Foiraj E-istaj Renkontiĝoj. Li redaktis la revueton *Saksa Kuriero* (1984-90) kaj aperigis novelaron *Hunda vivo* (1987).

Herbert WOHLFAHRT (1911-1999) mortis en Heidenheim (Germanio) la 22-an de decembro. Li estis la fondinto de la antisemita Nova Germana Esperanto-Movado, per kiu li celis eviti la malpermeson fare de la nazia reĝimo.



Petro Chrdle

Stanislava (Stanjo) CHRDLVÁ (1954-2000), aktivulino de la ĉeĥa E-movado, ĉefdelegito kaj UK-peranto por Ĉeĥio, forpasis la 28-an de januaro.

Esperantisto de la 15-jara aĝo, diplomita pedagogo, ŝi instruis E-on precipe per intensaj kursoj mallongaj, ne nur en Ĉeĥio, sed per Cseh-metodo ankaŭ eksterlande. Ŝi kunverkis la lernolibrojn *Esperantem za tři měsíce* (1995) kaj *Baza ĉeĥa konversacio* (1996). Multaj

memoros ŝiajn AIS-prelegojn pri pedagogiaj temoj, prezentojn (prelege, kante kaj dance) de la ĉeĥa kaj moravia folkloroj en diversaj E-arangoj, ĉiĉeronadon tra Prago kaj Ĉeĥio, ŝiajn ekspresan kurson de la ĉeĥa kaj prelegon pri Prago dum la 81-a UK, aŭ ŝian afablan kaj vigan partoprenon en la aranĝado kaj programo ekz. de Akademia kolokvo aŭ KAEST, kaj laste ankoraŭ organizan kontribuon al la SAT-kongreso kaj ILEI-konferenco en Karlovy Vary, somere de 1999, kiam ŝi prelegis pri lok-historia temo, malgraŭ jama intensa kuracado kaj malesperiga san-prognozo.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ✉ kependeryby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ✉ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ✉ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobrušovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ✉ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ✉ esp.togo@cafe.tg.

Estrarano (kulturo, landa agado): s-ro Tacuo Hugi-moto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ✉ jasu-k@mac.email.ne.jp.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ✉ kalle@esperanto.se.



ORGANIZA SOCIETO DE INTERNACIAJ ESPERANTO-KONFERENCJOJ

Internacia Esperanto-Konferenco 2000



*Multkultureco,
multlingveco kaj
kunvivado*

en Motovun
(Istrio, Kroatio)
15-21 de julio 2000

samtempe:
6-aj SOMERAJ
KURSOJ

poste:
tritaga ekskursprogramo
kaj
flugoj al 85-a UK en Tel-Aviv
(el Ljubljana kaj Venecio)

Orbis pictus de Višnja Brankovič, Via Leghissa 6,
IT-34131 TRIESTE; ☎/☎ +39/040 767 875;
✉ orbispictus@iol.it

AIKIDO-SPERTULOJ TURNAS KONTRAŬ LA FORTON DE LA KONTRAŬBATALANTO



La forto de la angla lingvo estas ke milionoj da homoj
volas ĝin lerni. Sed la lingvo estas stumbligema. Post
longa lernado oni kapablas ĝin legi, sed nur malmultaj
kapablas verki aŭ paroli senerare.

Everyone's Own Language

[Ĉies propra lingvo]

invitas legantojn *uzi* la anglan por lerni lerneblan
lingvon. Ĵurnalistino ene rakontas kiel ŝi trovis
Esperanton, legis Valane, kongresis, diplomiĝis pri
lingvistiko. *Everyone's Own Language* celas kaj
angla-lingvanojn kaj lernintojn. Ĝi informas kaj bone
instruas.

Dublin: Nitobe Press, 1999. 188p. ISBN 0 95352 840 5. €6,00.
Mendebla ĉe Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,
Dublin 12; ✉ esper@indigo.ie; UEA, ELNA kaj JEL.

SPECIALA OFERTO ĜIS LA FINO DE MAJO 2000

binditaj jarkolektoj de la revuo

ESPERANTO

1966	€ 6,80	1991	€ 16,35
1979	€ 14,95	1992	€ 16,35
1980	€ 16,35	1993	€ 23,15
1982	€ 16,35	1994	€ 23,15
1985	€ 16,35	1995	€ 23,15
1986	€ 16,35	1996	€ 23,15
1987	€ 16,35	1997	€ 23,15
1988	€ 16,35	1998	€ 23,15
1990	€ 16,35	1999	€ 23,15

Triona rabato se vi mendas tri aŭ pli da jarkolektoj.

Al la prezoj aldoniĝas 10% por aŭfranko (minimume € 2,25)
kaj (en EU) 6% por imposto.

Fondaĵo Canuto

*Multaj arde deziras membriĝi
en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via
donaco al Fondaĵo Canuto helpos
nin teni la kontaktojn kun tiuj,
kiuj suferas pro transpagaj baroj.
Antaŭdankon pro via solidareco!*

RET-INFO Retpoŝta Esperanto-novaĵservo
<http://www.esperanto.hu> ret-info@esperanto.org

KIO ESTU NIA LINGVOPOLITIKO?

POR AKTIVA LINGVOPOLITIKO.
Aktoj de la lingvopolitika
seminario en la 81-a UK de
Esperanto, Prago 1996. Red. D.
Blanke, R. McCoy kaj O. Buller.
Rotterdam: UEA 1999. 71p.
Prezo: € 7,10.

Ĉu ni bezonas lingvopolitikon? Kio
estas lingvopolitiko? Ĉu nur UEA
devus havi ĝin aŭ la tuta Esperanto-
komunumo? Kiel lerni el la spertoj
de naciaj lingvoj? Kontribuajtoj de H.
Tonkin, W. Bormann, Yamasaki S.,
A. Wandel, R. Corsetti kaj D. Blanke.


POR AKTIVA LINGVOPOLITIKO



Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŬIARTO estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legaĵon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KŬIARTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 2000 **KŬIARTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFA 2000

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	39,67 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2600 pesetoj	Pollando	9 eŭroj
Brazilo	9 eŭroj	Israelo	14 eŭroj	Portugallio	2900 eskudoj
Britio	13 eŭroj	Italio	36000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2300 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	20 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

LEGOLIBRO EL KANADO

LITO APUD LA FENESTRO.

Betty Salt (1907-1994).
Rotterdam: UEA, 1999. 111p.
Prezo: € 4,80.

Simplaj rakontoj, teatraĵetoj kaj
poemoj, kun kelkaj tradukoj el la
kanada literaturo. Stile belaj, ili
facile kaptas ankaŭ la malpli spertan
leganton, dank' al relative facila
lingvaĵo. Ankaŭ pro la mallongeco
de la plej multaj tekstoj la libro
bone taŭgas kiel progresiga legaĵo.



SALUTU DRAKE!

**AMUZAJ GLUMARKOJ DE
LA 56^a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
EN HONKONGO.**

14 plenkoloraj glumarkoj de
7 diversaj tipoj sur unu folio.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA:
€ 1,00 po unu folio.

Triona rabato ekde tri folioj.



Kongreso sur via koverto

Ideala ornamaĵo por viaj
leteroj en la monatoj an-
taŭ Tel-Avivo, la kongresa
glumarko estas mendebla
ĉe la Libroservo de UEA:
€ 1,35 po unu folio de 15.
Triona rabato ekde 3 folioj.



RESPONDOJ PRI RASISMO

"Infano estas
scivolema. Ĝi faras
multajn demandojn kaj
ĝi atendas precizajn
kaj konvinkajn
respondojn. Per ĉi tiu
libro mi provas
 respondi la demandojn
de mia filino. Ĝi celas
la infanojn kiuj
 ankoraŭ ne havas
 antaŭjuĝojn kaj volas
 kompreni. Pri la
 plenkreskuloj, kiuj ĝin
 legos, mi esperas ke ĝi
 helpos ilin respondi la
 demandojn, pli emba-
 rasajn ol ni kredas, de
 siaj propraj infanoj."

(Tahar Ben Jelloun)
Tiu ĉi libro de la Marok-devena aŭtoro enorme
furoris en Francio. En 1987 Tahar Ben Jelloun
gajnis la prestiĝan Premion Goncourt.



PAĈJO, KIO ESTAS RASISMO? Tahar Ben Jelloun (1944). El la
franca trad. Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil. Rotterdam: UEA,
1999. 52p. ISBN 92 9017 063 8. 19cm. Prezo: € 6,50.

POR FACILE TROVI ALIAN VORTON

ESPERANTAJ SINONIMOJ. Jaan Ojalo
(1914). Rotterdam: UEA, 1999 (3-a,
korektita eld.). 96p. Prezo: € 7,20.

Ofte oni sentas la bezonon vigligi kaj
variigi sian stilon per uzo de sinonimoj
aŭ de preskaŭ-sinonimoj. Por helpi en
tio, la estona aŭtoro kompilis tiun ĉi
vortaron. Bazita sur PIV, ĝi enhavas
1925 kapvortojn kaj 5500-vortan
indekson. Taŭga fonto por ĉiu kiu
volas pliriĝi sian vortostokon.

